6-a Jaro. N-o 281 APERAS SEMAJNE Leipzig, 20./2. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerfiner

LA ESTONTA MILITARMILO

Se la laboristaro estus nur tiel longvida kiel la kapitalistaro, jam estus certigita la finvenko de la nuna socisistemo. Ĉiu kutimiĝas al la proverbo "Se oni deziras pacon, do preparu militon". Kaj ĉiu pensemulo bone scias, ke pli malpli baldaŭ tia malfeliĉego nin atingos kiel antaŭe. Sed estos nur unu granda diferenco — ke la scenejo de la amasbuĉado ne estos limigita je aparta loko aŭ lando, sed oni trudos al ĉiu urbo kaj vilaĝo la militon novan, kien ajn la militistoj volas. Tiel ĉiu enloĝanto, ĉu tiu estas viro, ĉu virino, ĉu infano, rajtos sperti la duban plezuron partopreni en aktiva militado laŭ la plej lasta metodo — per venengaso.

Nuntempe ĉiuj okuloj direktiĝas al Londono, kie en la reĝa palaco de Sankta Jakobo (St. James) la ĉefministro de Britio prezidas la konferencon de reprezentantoj el eŭropaj landoj kaj Ameriko. Kiel ĉiu jam scias, ilia celo verŝajne estas per longedaŭraj diskutoj fari interkonsenton rilate la limigon de armilaro militŝipa. Tre laŭdinda celo! Pacamantoj tra la tuta mondo, de la reĝo de Britio ĝis ties plej malriĉa regato, ĝoje salutas la penadon de ĉi tiuj potenculoj. Pli da povo al ilia kubuto! Ĉu ili ne pavimas la vojon celkonforme por la efektivigo de l' homfrateco?

Sed permesu vin atentigi, ke estas alia flanko de la bildo. Troviĝas muŝo en la ŝmiraĵo! Ĉi-semajne la Prezidanto de la Asocio de Kemi-Industrio faris rimarkindajn asertojn rilate al la uzo de kemiaj elpensaĵoj en moderna militado. Laŭ lia vidpunkto malarmado militŝipa estas nur afero por konservi monon: Se oni faras malpliigon en la produktado de militŝipoj, pafiloj kaj de virpovo, do estas necese, ke oni sin turnu al la disvolvo de la kemia armilo. Kiajn ajn protokolojn oni subskribos, la registaroj uzos venengason en la militado, kiam la tempo maturiĝos. Li konstatis, ke estas konsilinde, ke la britaj kemiistoj orientiĝu koncerne la nacian povon rilate al defendo en la okazo de tia atako. Tro grava estas la afero por povi esti malatentota.



Venengaso disblovata de du aeroplanoj kontraŭ militŝipoj.

Sur nia bildo temas pri sendanĝera fumnebulo, ĉar estas "pactempo" Kompreneble dum milito tiu nebulo, kiu rapide ĉirkaŭas la ŝiparon, konsistus el forta venengaso. La originalfoto estas sendita al "S-ulo" de 20-jara maristo en la Brita militŝiparo.

Laŭ la Ĝeneva Protokolo de 1925 oni malpermesas la uzon de asfiksiaj gasoj, sed samtempe ne malpermesataj estas fumŝirmiloj, kvankam ĉi tiuj malbone efikas sur homojn. Plie, ĉu la malpermeso tuŝas larmgasojn, kiujn oni uzas eĉ en pactempo en Usono por trakti tumultojn kaj domrabistojn kaj kiuj ne estas venenaj?

Estas interese rimarki, ke la komparo de rezultoj rilate al gas- kaj artileri-militado montras okulvideble tre grandan diferencon. Oni konstatas, ke, laŭ la statistikoj de la lasta milito, pli facile efektiviĝis la militaj rezultoj kaj *kun malpli da homsuferado pro la uzo de gaso ol eksplodiloj.* Venengaso vundas aŭ mortigas en multe pli malgranda proporcio ĉe tiuj, kiuj ne plu batalas, ol iu alia armilo.

Laŭ oficiala statistiko de 1. januaro ĝis 30. septembro 1918 la nombro da germanaj viktimoj gasumitaj estis proksimume 58 000; el ĉi tiuj malpli ol 3 elcentoj mortis. De 1. ĝis 10. aŭgusto 1918 la francaj gasviktimoj estis 14 578; el ĉi tiuj 2,9 elcentoj mortis. De 15. septembro ĝis fino de la milito entute la britaj viktimoj pro venengaso estis 24 363, la elcento da mortoj 2,2.

El ĉiuj 100 viktimoj rezulte de ĉiu alia speco de armiloj krom gaso mortis pli ol 25%; ankaŭ el tiuj, kiuj postvivis, 40% restos vunditaj aŭ blindigitaj dum la resto de sia vivo. Oni kalkulas, ke pro mustard-gaso mortis 1 kontraŭ 40, kiuj ne plu povis batali, dum pro bomboj mortis 1 el 3.

La rezulto de limigo de armilaro estus, ke ĉe la eksplodo de nova milito oni prizorgus pliigon de la venengaso kiom eble plej rapide, kaj pro tio pafiloj kaj bomboj malnecesiĝas.

En ĉiu lando, kie troviĝas alkalia industrio, estus disponeblaj grandnombre gascilindroj; gason en ujoj oni povus ĵeti mane de aviadiloj, tankoj kaj kirasveturiloj. Ankaŭ en la daŭro de 24 horoj estus eble trans-

LA POLA IMPERIALISMO


La naskiĝo de l' imperialismo

Laŭ Marks la valoron de ĉiu fabrika produkto konsistigas, ekster la plusvaloro, du aliaj: 1. la tielnomata *konstanta kapitalo,* tio estas la valoro de maŝinoj, de fabriko, de krudaĵo k. a. valoroj, kiuj estas necesaj por produktado, k kiuj devas esti pagitaj; 2. la *varia kapitalo,* tio estas la viva forto, la salajroj de laboristoj. El tiuj du valoroj nur la dua kreas al la kapitalisto la plusvaloron. La laboristo en sia 8-hora laboro, dum ekzemple 2 horoj, laboras senpage, tial ke ricevante, ni diru, por tiu tempo 8 monerojn, li kreas produkton je multe pli alta socia valoro. Se tamen la kapitalisto, devigita de la konkurado, enkondukas en sia fabriko pli modernajn maŝinojn, kiuj elpuŝas parton de la laboristaro, li gajnas nun ĉe ĉiu *unuopa* produkto pli malmulte (la elpuŝitaj laboristoj ne plu kreas la plusvaloron; k la maŝinoj, la konstanta kapitalo ne kreas ĝin, kiel dirite.) Por ke tamen la profito de kapitalisto restu almenaŭ la sama, li devas *plimultigi* la produktadon. Mi ripetas: *la profito ĉe unuopa produkto malpligrandiĝas, la ĝenerala profito restas la sama aŭ kreskas.* Ni do vidas, ke la kapitalistoj estas devigataj pligrandigi la produktadon, tamen ĉe granda produktado oni devas havi grandan nombron da aĉetantoj. Tiun nombron la kapitalistaro trovas ekster sia lando, k eĉ ekster "sia" kontinento — tio jam estas la nuna periodo en disvolvo de kapitalismo (la periodo *imperialisma*).

Ni bone memoru pri kialoj de tiu periodo: ĝi ne estas nur la triumfo de l' kapitalismo, sed ankaŭ ĝia finiĝo. La anglaj fabrikoj laboras por Hindio, la germanaj serĉas aĉetantojn en Polio. La multaj polaj teksfabrikoj (en Lodz) vendas siajn produktojn al ekster-eŭropaj landoj (Hindio, Persio ktp.), dum la laboristoj de la samaj fabrikoj ne povas aĉeti tiujn produktojn.

Formoj de kolonia politiko

Tiel kreiĝas diversaj *kolonioj,* landoj duagradaj, kien oni vendas siajn produktojn, el kiuj oni havigas al si necesajn krudmaterialojn, el kiuj oni prenas la ridinde pagatan k terure ekspluatatan laboriston, en kiuj oni fine havas necesajn militajn barojn. Oni bonege memoros la unuan grandan imperialistan militon en jaro 1914! Tiaj militoj bone karakterizas la nunan ekonomian periodon. Estas tamen diversaj formoj de kolonioj. La plej simpla, bruta formo estas tia de la



Parlamentismo k faŝismo en Polio

transmaraj kolonioj de Granda Britio. Kvankam ne ekzistas en ili teroro kultura: oni ne devigas la negrojn, la aŭstralajn gentojn lerni la anglan lingvon, — tamen oni ekspluatas ilin kiel eble plejmulte (jes, K-do Lanti[1]!). Se oni kreas en Hindio fabrikojn, tio ne estas fabrikoj hindaj, sed anglaj starigitaj pli proksime de krudmaterialo, laboristo k aĉetanto. En tiu agado la kapitalisto trovas plej bonan helpanton en persono de "dia servisto", de pastro, kiu laŭ konata metodo montras al mizera sovaĝulo la ĉielon, por ke li ne ekvidu sur la tero la ekspluatanton. Inter aliaj "kulturaj bonoj" la mizerulo konatiĝas ankaŭ kun alkoholo k sifiliso.

Ni konas ankaŭ aliajn formojn de kolonio. Ili nomiĝas diverse: ĉu protektlandoj de unuj ŝtatoj super aliaj (Anglio-Palestino); ĉu permandata estrado de tielnomataj "financaj konsilantoj" (usonano Deve [Devey] en Polio). Fine ekzistas kolonioj sennomaj: tiuj landoj restas liberaj, tamen ludas fakte duagradan rolon (landoj de Latina Ameriko rilate al Usono). Ofte civitanoj de tia lando tute ne komprenas la situacion. Tio estas nia kultura, eŭropa formo de kolonia politiko.

[1] Sed ĉu mi iam ajn neis la fakton?!! Stranga rimarko. — E. L.

La signifo de Polio por la imperialistoj

Post fino de la granda milito, post proleta revolucio en Rusio, la eŭropaj potencoj komencis organizi unuecan fronton kontraŭ la unua proleta ŝtato. Multaj konferencoj, planoj de Doz (Dawes), Jang (Young), celis nur tion: forigi ĉiujn internajn konfliktojn, unuece stariĝi kontraŭ Sovetio. Por Polio tio signifas, ke ĝi devas estiĝi la postlando de Germanio. Ĉi lasta devas pagi siajn ŝuldojn; oni malfermu la polan limon por la germana eksporto k ĉio estos bona. Tamen Polio ankaŭ estas necesa por la eŭropa imperialismo; ĝi ne devas perei. Ne, ĝi ne pereos! Ĝi havas forton por krei propran polan imperialismon!

Pri tiu pola imperialismo temas ĉi tie. — Polio, dum pli ol jarcento disŝirita inter tri potencoj: cara Rusio, Germanio k Aŭstrio; Polio, kiu plej bone konatiĝis kun teroro; Polio, kies junularo devis lerni k paroli fremdajn lingvojn — ĝi nun aplikas la metodojn de siaj okupantoj rilate al la popoloj de ĝi akiritaj, en sama, se ne pli granda mezuro. Tiuj popoloj estas la ukrainoj k la blankrusoj.

Pola faŝista registaro ne uzas kompreneble vortojn Ukrainio k Blankrusio. La plejmulto da poloj ankaŭ malmulte scias, ke grandaj orientaj teritorioj de Pola Respubliko estas apartaj landoj kun aparta loĝantaro, parolanta apartan lingvon. Oni parolas pri malplimultoj naciaj en Polio k tiam enkalkulas en ties nombro tiujn gentojn. Estas granda miskompreno, se ofte eĉ proletoj, radikalaj rondoj parolas pri blankrusoj k ukrainoj en Polio same kiel pri judoj k germanoj aŭ rusoj. Oni devas bone memori, ke judoj, germanoj, rusoj en Polio loĝas en diversaj urboj de pola lando, dum *blankrusoj k ukrainoj sur sia teritorio formas la plimulton.* Malgraŭ tiu nedisputebla fakto la ukrainoj vane postulas sian propran universitaton en Leopolo (Lvov). Ili devas studi ĉe polaj universitatoj k pollingve. En Lvovo ekzistas pola universitato, kiu ludas rolon de faŝista posteno. En Polio oni multe parolas pri "ĉiam fidela al Polio Lvovo", pri alto de l' pola kulturo; oni diras, ke estas por Ukrainio feliĉo aparteni al pola ŝtato, ke Polio defendas Ukrainion kontraŭ bolŝevika infekto (al Polio apartenas nur parto de Ukrainio, same kiel al Ĉeĥoslovakio, la resto estas "infektita"). Kompreneble malamo al poloj estas granda k ofte oni aŭdas pri stratbataloj, kiel en Lvovo.

Mi aldonu ankoraŭ, ke oni neniam en Polio parolas pri ukraina lingvo, oni nomas ĝin rutena k komprenas je tio miksaĵon rus-polan, forgesante, ke en tiu miksaĵo estas kreita k kreata riĉa k bela literaturo. Ne ekzistas blankrusaj k ukrainlingvaj popollernejoj, nur la tielnomataj "utrakv-

---

formi komercajn aeroplanojn en bombmaŝinojn. Ŝajnas, ke la de militistoj proponita limigo de armiloj povus pliigi la gravon de la kemia armilo, kaj estas tre signifoplene, ke la militaparato por venengasoj estas sama aŭ simila al tio, kion oni uzas en la fabrikado de tinkturaĵoj.

Fine, por ke ĉio estu deca kaj bonorda, estas prudente, ke la Ministraro de Militaferoj kaj la kemiaj fabrikistoj interrilatiĝu en pactempo. Jen la packontrakto, kiun faras la diplomatoj. Kiel ruze ili sternas la reton antaŭ la laboristaro! *Ofiro.*

istaj“, dulingvaj lernejoj. Teruraj rilatoj sur kultura kampo respondas al tiuj sur la ekonomia. En tempoperiodo ĝis majo 1926, kiam la registaro estis en la manoj de la Nacia Demokratio (en Polio nomata: *endecja*), partio konservativa, kies ideologion esprimas plej bone la vortoj: Dio, Patrujo, Batu judojn! — oni aplikis plej terurajn metodojn rilate la supre cititajn okupitajn landojn.

Internaj kontraŭstaroj

Tamen la faŝista registaro de Pilsudski pli bone komprenis la interesojn de l' pola burĝaro, k ĝenerale de l' eŭropa burĝaro. La registaro komprenis, ke okupitaj landoj estas necesaj, por ke la pola industrio povu plue labori k vendi siajn produktojn, ke okupitaj landoj estas riĉaj, fruktodonaj: Oni nur devas scii preni tiujn fruktojn. La pola burĝaro forgesis pri “naciismoj“ k subite ekkonis, ke ukraina k klankrusa burĝaro estas “aminda“. Ekkomencis enuigi la burĝaron de l' okupitaj landoj la naiva kriado; ĝi komprenis, ke estas preferinde fratiĝi kun la pola burĝaro ol atendi propran socian revolucion, ĉar la proletaj amasoj de l' okupitaj landoj nur tiel komprenas la liberiĝon. La situacio nun estas tia: Burĝaj organizoj naciistaj el Ukrainio k Blankrusio pli malpli laŭte krias k protestas, tamen verdire estas pretaj doni la manon al la pola burĝaro, akcepti ĉion, kion Polio donos por kune kontraŭbatali la de tago al tago kreskantan, revolucian movadon. La polaj socialistaj partioj (P. P. S. pola, Bund, juda k. a.) en sia “movado“ tute ne celas la liberigon de l' okupitaj teritorioj. Evidentiĝas, ke ĉe unu k alia flanko nur la plej radikalaj, la komunistaj partioj vere havas kiel kunan celon “liberiĝi el ekonomiaj k naciaj katenoj“. Ukraina k blankrusa komunistaro kunlaboras en klasa batalo kun pola proletaro, k la lasta batalas por plena socia k nacia liberigo de l' nepolaj landoj, el polaj katenoj.

Oni bone vidas, ke ne “poloj“ terorigas ukrainojn, sed pola burĝaro — la ukrainan k blankrusan proletaron. En nuna periodo la eŭropa burĝaro ĉie serĉas en siaj rondoj amikon por unuece stariĝi kontraŭ la unua socialista ŝtato. Pola burĝaro devas precipe plifortiĝi, ĉar en estonta kontraŭsovetia milito ĝi ekludos rolon de kapitalista posteno plej proksime staranta ĉe limo de l' kreskanta socialismo.

Laŭ komunista vidpunkto de Leono (14 839)

PRI LA GRAVO DE LA GAZETARO

La gazeto estas samtempe buŝo k orelo por la regantoj kiel por la regatoj. Ĝi klinas la orelon al unu aŭ alia flanko k uziĝas kiel parolilo ambaŭflanken. Sed ĝi ne nur estas akceptanto k donanto; ankaŭ pripensanta k stimulanta ĝi donas sin. Enŝoviĝante inter donon k prenon ĝi peradas inter popolo k registaro. Ĝi teksas k kreas je la historio, helpas forigi antikvajn ideojn k kunhelpas je nova kodo.

Ĝia influa potenco estas tiom grava, ke ĝi decidas inter pledo por aŭ kontraŭ leĝakcepto. Sur kio baziĝas tiu potenco, samsignifa kiel tiu de la mono? Ĝi ampleksas ĉion, ĉar ĝi enpenetras la cerbojn de la unuopuloj, la konduton de la socio, k ĉerpas el la informejo registara. La mono nur valoras, agnoskata de ĉiuj, k senvaloriĝas perdante la agnoskon. Tiel same altiĝas k falas la influo de la gazeto, kiel ĝia reputacio kreskas aŭ malmultiĝas. Konservi k certigi sian aŭtoritaton, estas ĝia intereso.

La aŭtoritato radikiĝas en pravo de gazeta enhavo. Fidinda informservo estas unua premiso por la prospero de gazeto. Nenio pli skuas ĉe la bazo de la presaĵo, ol korektenda raporto pri okazintaĵo. Personoj estas destinataj, respondece havigi al redaktoro koncizan, klaran informon rektmane el registrejoj k administrejoj. La kvanto da abonantoj ne sole difinas la influon gazetan; temas nur, kiel kompetentaj personoj protektas la koncernan gazeton. Serioza leganto nur taksas ĝin laŭ aktualo k pravo de la enhavo. Sendemande, varbanta gazeto klopodas honeste servi al la homa bonfarto.

Ĉiu partia aŭ ekonomi-politika gazeto konsideras sian klasan aŭ grupan celon kiel plej gravan. Tiel estiĝas la akraj tendencoj k eĉ kontraŭdiroj.

En demokrate regata lando la registaro konsistiĝas laŭproporcie el la partidelegitoj. Do la opinioj speguliĝas kiel via vizaĝo en ridkabineto *(kurbaj speguloj)*. Kompreneble la kompromisantoj retenas la decidan deklaron, ĝis ĝi estas matura por aperi en gazetoj. Ofte el 2+2 la kompromiso faras 5, aŭ ege estas refutata pure partia propono. Por reguligi la ĥaoson, ekzistas en Germanio, en Berlino, speciala gazetara fako. Ĝia gvidanto estas pursanga ĵurnalisto Georgo Ŝvajcer (Schweizer). Li ordigas la ricevitajn sciigojn gazetajn, komunikas al ministerioj en- k eksterlandaj gazetartikolojn, donas al scivolemaj ĵurnalistoj direktivojn, k estas kvazaŭ respondeca pri registaraj deklaroj. Krome en ĉiuj ministerioj estas gazet-sekcioj. Ilia estro estas d-ro Ceĥlin (Zechlin), kiu kompilas la presmaturajn deklarojn. Inter unuopa ministerio k centra gazetara fako peradas reciprokajn sciigojn apartaj gazetar-raportantoj.

El tio entute la leganto de “S-ulo“ povas konkludi, ke aperigitaj artikoloj estas sufiĉe “frizitaj“. *Fluder (10 746).*

PRI UNUECO KAJ KLASBATALO

Multo jam estas skribita pri unueco de la laborista klaso. Ankaŭ jam kelkaj parti- k sindikat-gvidantoj elparolis siajn dirojn pri tiu afero. Sed ĝis nun oni nur ĉiam restis ĉe la konsento; praktikaj paŝoj por efektivigo ne estis entreprenataj. Tamen la lasta jardeko klare montris al ni, ke la laboristaro per la ĝis nun aplikita klasbatal-metodo nenion povas atingi. Kiam ni pritraktas la klasbatalan metodon de la socialistaj partioj precipe post la jaro 1918, ni povas konstati rimarkindan fakton: Inter la laboristaj partioj evoluas malamo k batalo, kiu por ĉio taŭgas, krom por helpi al la laboristoj atingi pli bonajn vivkondiĉojn. Anstataŭ unuanime kontraŭbatali la vampiran klason, oni praktikas reciprokan batalon. Oni pelinstigas la laboristojn unu kontraŭ la aliajn, k la rezulto estas: Unu laboristo disbatas la kapon al la alia. Preskaŭ ĉiutage oni povas legi en la laboristaj partiaj gazetoj demagogiajn agitajn artikolojn. Malgraŭ tio ĉiuj laboristaj partioj portas standardojn kun surskribo: “Proletoj ĉiulandaj unuigu vin!“ Sed per tiuj agmanieroj unuiĝo ne estas ebla. Ŝajnas, ke niaj ĉefaj gvidantoj fakte ne volas unuiĝon de la laboristaro, sed male volas fari por si el klasbatalo neniam finiĝontan metion. Ili nur celas atingi bone pagatajn oficojn, k kiam ili tion atingis, ili forgesas la veran klasbatalon.

Se la laboristoj plendas, ke ne estas videbla progreso en la laborista movado, tiam niaj ĉefgvidantoj nin nur ĉiam konsolas k rakontas, ke tiu afero ne estas tiel facila kiel oni pensas. Estas tre rimarkinde, ke ĉiam, kiam temas atingi ion por la laboristaro, la afero estas tiom malfacila. La samo do ankaŭ devus esti ĝusta por la vampira klaso! Sed la malo estas videbla. La kontraŭbatalata kapitalista klaso plifortiĝas, k aliflanke ni povas konstati, ke la laboristo hodiaŭ estas pli multe ekspluatata ol iam ajn antaŭe. La laboristara mizero kreskas de tago al tago, k la kapitalistoj pli impertinentiĝas en sia ekspluatado. Tio pruvas al ni, ke

PROLETARIA KANTARO

La elekto de la kantoj, ilia proleta tendenco, ilia internacia valoro, la fakto, ke ĉiu povas studi kaj kanti ilin dank' al la muziknotoj zorge presitaj, faras el tiu volumo unikan verkon, kiaspeca ne ekzistas ĝis nun en iu nacia lingvo.

Prezo: 2,50 mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig 0 27

la ĝis nun aplikitaj batalrimedoj ne plu taŭgas.

Se la laboristoj fakte volas liberigi sin de siaj ekspluatantoj, ekzistas nur unu rimedo, nome, devigi la parti- k sindikat-gvidantojn ĉesigi la verkadon de reciprokaj provok-artikoloj en la laborista gazetaro. En sia bazo la tuta lab. gazetaro devos esti ŝanĝata. Izolitaj vi estas nenio, sed unuigitaj grandega potenco. Sed tio ne signifas unuigi la laboristaron en multaj diversaj partioj aŭ eble en cent meti-sindikatoj kiel estis ĝis nun. Por ĉiuj laboristoj devas esti la devizo: For la splitiĝon de l' laboristaro en diversajn partiojn k metiajn sindikatojn. Por klasbatalanto povas miaopinie ekzisti nur du partioj aŭ klasoj: unu ekspluatanto k alia ekspluatata. Kial do tiom da partioj k sindikatoj en ĉiu lando? Ĉiu, kiu laboras por salajro, estas laboristo k devus esti organizita en unu sola partio aŭ sindikato, egale, ĉu li estas seruristo, teksisto aŭ bakisto. Kelkaj gvidantoj asertas, ke ili jam delonge celas tion, sed ke nur la laboristoj kontraŭstaras unuiĝon de l' tuta lab. klaso. Tiu aserto estas ne kredebla, k eĉ se estus tiel, ke granda parto de l' laboristaro ankoraŭ ne emus unuiĝi tiele, oni povus alveni al tio. Por kio ni posedas lab. gazetaron? Ĉu nur por reciprokaj provokoj? Mi estas konvinkita, ke se la laborista gazetaro publikigus tiom da klarig-artikoloj favoraj je tia grandega unuiĝo, kiom ĝi publikigis ĝis nun da demagogiaj, tiam la laboristaro jam delonge estus preta realigi ĝin por la bono de l' laboranta homaro.

SAT-ano 14 157, Krimiĉaŭ
(Crimmitschau, Germ.)

AGADO ESTAS VIVBEZONO

Iu infano vidis bluan papilion, sidantan sur herbotrunketo; la papilio estis rigidigita de la norda vento. La infano ŝiris la trunketon, k la vivanta, rigidiĝinta floro, kuŝanta ĉe la ekstremo, restis tie. Li revenis, tenante en mano la trovaĵon. Sunradio ekbrilis; ĝi trafis la flugilojn de l' papilio, k subite, reviviĝinta k malpeza, la vivanta floro ekflugis en la lumon:

Ni ĉiuj, serĉantoj k laborantoj, iel similas la papilion: nia forto konsistas el lumradio; — ne eĉ: el espero pri lumradio. Oni do devas scipovi esperi: la espero estas la forto, kiu portas nin alten k antaŭen.

— Sed tio estas iluzio!

— Ĉu vi estas certa pri tio? Ĉu do oni ne devas fari paŝon pro timo, ke la tero elglitos de sub niaj piedoj? Ne sufiĉas rigardi tre malproksimen en la estontan aŭ en la pasintan tempon, necesas rigardi en sin mem, necesas tie vidi vivajn fortojn, kiuj volas esti elspezataj, k necesas agi.

* * *

"Ĉe la komenco estis la agado", diras Faŭsto. Ni retrovas ĝin ankaŭ ĉe la fino. Se niaj agoj akordiĝas kun niaj pensoj, oni povas ankaŭ diri, ke niaj pensoj ĝuste respondas al la ekspansio de nia aktiveco. La plej abstraktaj sistemoj metafizikaj estas nur formuloj de sentoj, k la sento respondas al la streĉo de la pli aŭ malpli granda interna aktiveco.

Estas ia mezo inter la dubo k la kredo, inter la necerto k la kategoria aserto, ĝi estas la agado; per ĝi sola, la necerto povas fariĝi realo.

Mi ne petas, ke vi blinde kredu iun idealon, mi petas, ke vi laboru por ĝin realigi. —

— Ne kredante pri ĝi?

— Por ke vi kredu ĝin. Vi kredos, kiam vi estos laborintaj por ĝin estigi. Ĉiuj malnovaj religioj volis fari el ni kredantojn per la okuloj k la oreloj. Ili montris al ni Dion kun karno k ostoj, k la sanktaj Tomasoj tuŝis lin per la fingro k estis konvinkitaj. Nuntempe ni ne plu povas sammaniere esti konvinkataj. Eĉ se ni vidus k aŭdus, k tuŝus per la fingroj, ni obstine ankoraŭ neus. Oni ne estas konvinkita pri neebla afero, tial ke oni kredas ĝin vidi aŭ tuŝi: nia racio estas nun sufiĉe forta por ignori, se necese, niajn okulojn, k la mirakloj povus konvinki neniun. Estas do necesa nova konvinkorimedo, kiun la religioj mem jam profite uzadis: tiu rimedo estas la agado: vi kredos proporcie laŭ tio, kion vi faros.

Sed, la agado ne devas konsisti el eksteraj gestoj k maldelikataj ritoj: ĝi devas esti tute interna en sia fonto; nia kredo tiam venos vere el la interno, ne el la ekstero: ĝi havos kiel simbolon ne la rutinon de *rito,* sed la senliman variecon de la *invento*, de la spontana k individua verko . . .

. . . Nur la agado donas fidon al ni mem, al aliuloj, al la mondo. La pura meditado, la soleca penso fine forprenas de vi la fortojn. Kiam oni restas tro longe sur la altaj suproj, ia febro el senlima laco kaptas vin; oni

KULTURTASKOJ

M. Krjukov

(2-a daŭrigo. Vidu n-ojn 279, 280)

3. En skribo

3. 1. Propagandi k akceli enkondukon de sola por ĉiuj popoloj esperanta alfabeto (kun memkompreneblaj ŝanĝoj k necesaj aldonoj). Por transdoni mankajn en esperanto sonojn de kelkaj popoloj (*i malmola* de la rusa, pola k itala; *u, ö, ä* de la franca, germana k angla) servu la literoj *y, ü, õ, ä.* Ili estas tre bezonaj por pli ĝuste transdoni t. n. proprajn k geografiajn nomojn. Same estus tre utila speciala signo por malmola l (angla, rusa, pola, tatara).

3. 2. Same propagandi k akceli pluan iom-post-ioman simpligon de litertipoj per eventuala helpo de pentrartistoj-litertipistoj. Ekz. anstataŭ la tre komplika k artifika litero **g** ili povas kutimigi la pli simplan presformon **g** anstataŭ la duelementa *d* ili povas uzigi la bone rekoneblan unuelementan formon *ð* ktp.

3. 3. Nun ni uzas ne unu alfabeton, sed fakte 4 malsamformajn paralelajn alfabetojn:

A B C D G . . ., a b c d g . . .,

𝒜 ℬ 𝒞 𝒟 𝒢 . . ., *a b c d g* . . .

Oni devas samtipigi ilin. T. n. grandaj literoj distingiĝu de l' malgrandaj ne per formo, sed nur per grando. Same unuformiĝu pres- k skribliteroj. Ĉiu *superflua* signo en uzado estas muelŝtono sur kolon de sekvantaj generacioj.

3. 4. Buŝlingvo per nuancoj de voĉo pli riĉe k bone esprimas la penson, ol skriblingvo, kiu uzas nur sintaksajn signojn, disfrazigilojn (. , ; : — . . .). Ĉi tiun mankon de skriblingvo oni povas facile malfortigi per specialaj signoj por montri la esprimatan de voĉo emocion. La signoj estas nemultaj k facile memoreblaj. Oni povas ilin facile lerni anstataŭ tute superfluaj kapliteroj (grandaj literoj): demando ?; aserto ↓; dubo, hezito ꞩ; ironio, moko ɜ; kolero, indigniĝo ꓘ; malĝojo ^v; ordono, insisto →; miro √^; admiro, ĝojo ∀; digno, honoro ᑯ; honto, konfuzo, konsterniĝo Ᵽ; voko, akcentigo, ŝato ↑; altigo de voĉtono X; peto, espero ¿; malrespekto, arogo ʌ̃; malŝato ←; kareso, mildo ∾; timo, teruro ⊥; senemocia voĉtono <>; estimo, respekto y. Ĉi tiuj signoj povas esti kombinataj por montri pli komplikan esprimon de voĉo (simile al la nune uzata kombino?!). La signoj metu antaŭ la frazo (ne post la frazo kiel nun), por ke leganto komprenu karakteron de la frazo antaŭ ol prononci ĝin.

3. 5. Kutimiĝi al regule difinitaj mallongaj formoj de la plej ofte uzataj vortoj k esprimoj. Anstataŭ la plenaj formoj de l' vortoj *kaj, estas, ekzemple, ĉirkaŭ, horo, metro, tiel nomataj, kaj tiel plu, kaj similaj, kaj ceteraj, kaj multaj aliaj* kutimiĝu uzi sen punktoj jenajn iliajn mallongajn formojn: *k, e, ekz, ĉ, h, m, tn, ktp, ks, kc, kma.*

Sole pro uzo de mallonga *k* sen punkto en ĉi tiu artikolo estas ŝparitaj ĉ. 600 literoj. Ju pli mallongaj estas vortoj, des pli facile kaptas ilin la okulo k des pli facile k rapide orientiĝas en ili la penso.

dezirus ne plu malsupreniri, sed halti, ripozi; la okuloj fermiĝas; sed, se oni ne rezistas al la dormemo, oni ne plu vekiĝos: la penetra malvarmo el la altaĵoj glaciigos vin ĝis la osta medolo; la malvigla k dolora ekstazo, kies invadon vi sentis, estis la ek-mortiĝo.

La agado estas la sola rimedo kontraŭ la pesimismo, kiu, cetere, povas enteni parton da vero k utilo, kiam ĝi estas konsiderata laŭ sia plej alta aspekto. La pesimismo, efektive, konsistas ne el plendado kontraŭ tio, kio estas en la vivo, sed el plendado pro ĝiaj mankoj. Kio estas en la vivo, tio nemulte konsistigas la ĉefan kaŭzon de l' homaj malĝojoj, k la vivo en si ne estas malbono. Koncerne la morton, tio estas nur la malo de l' vivo...

... La agado, en sia naskopovo, estas ankaŭ rimedo kontraŭ la skeptiko: ĝi faras al si, tion ni montris, sian internan certon. Ĉu mi vivos morgaŭ, post unu horo? ĉu mia mano povos finskribi ĉi tiun frazon? Tion mi ne scias. La vivo, de ĉiuj flankoj, estas tegita per nekonataĵo. Tamen mi agas, mi laboras, mi entreprenas; k en ĉiuj miaj agoj, en ĉiuj miaj pensoj, mi konjektas tiun estonton, pri kiu nenio rajtigas min kalkuli. Mia aktiveco preterpasas ĉiuminute la nuntempon, invadas la estonton. Mi elspezas mian energion ne timante, ke tiu elspezo estas senkompensa perdo, mi trudas al mi seniĝojn kun la espero, ke la estonto kompensos ilin; mi laŭiras mian vojon.

Tiu necerto, kiu, premante min egale el ĉiuj flankoj, egalvaloras por mi al iu certo k igas ebla mian liberon, ĝi estas unu el la fundamentoj de la spekulativa moralo kun ĉiuj siaj riskoj. Mia penso antaŭeniras, kiel mia aktiveco; ĝi aranĝas la mondon, disponas je la estonto. Ŝajnas al mi, ke mi estas la mastro de la senlimeco, ĉar mia povo estas ekvivalenta al neniu difinita kvanto; ju pli mi faras, des pli mi esperas ... *M. Gujo (Guyau).*

El "Skizo pri moralo sen devigo nek sankcio", pĝ. 173, 174, 175, 176 de la XIII-a eldono. Trad. el la franca *Herezulo.*



★ DIVERSAĴOJ ★

Societo por savi balenojn

En Baltimore ĉe universitato je nomo de Johano Hopkins formiĝis societo de naturesplorantoj, kies celo estas klarigado al publiko pri neceso lukti kontraŭ ekstermado de balenoj. Nelonge post malfermo de tiu ĉi societo multaj verkistoj k reprezentantoj de diversaj sciencoj fariĝis anoj de la societo. *R. Ŝapiro-Vikker.*

Kokosnukso

La kokosnukso havas grandan signifon en la vivo de multaj nacioj. En multaj landoj la loĝantaro ekzistas dank' al la kokosnukso. Ĝi donas al ili nutraĵon, trinkaĵon, vestaĵon k loĝejojn. Oni manĝas la frukton antaŭ la maturo. Oni trinkas la akvosimilan fluidaĵon aŭ la lakton de la frukto. El la suko de l' arbo oni faras sukeron aŭ palminon. Folioj de l' kokospalmo kovras la tegmenton de dometoj. La kokosnukso enhavas la plej riĉan oleon k ĝi estas tre digestebla. Ĉiu parto de l' kokosnukso estas utila. La arboj donas fruktojn post sep jaroj. Ili vivas ĉirkaŭe cent jarojn. Ĉiujare la arbo donas ĉirkaŭe tridek faskojn, k ĉiu fasko konsistas el ses aŭ dudekkvar nuksoj. Sed la kokosnukso havas ankaŭ malamikojn: la ratojn. Tiu ĉi malamiko ekstermas la kokospalmojn.

R. Ŝapiro-Vikker.

Kiom da tempo restas heltago en la mondo?

En Stokholmo la plej longa taglumo en la jaro daŭras 13½ horojn, dum sur la insularo Ŝpicbergen oni povas ĝui la taglumon preskaŭ 3½ monatojn. En Londono la taglumo daŭras 16½ horojn, dum en Leningrado k Tobolsk la plej longa taglumo daŭras 19 horojn k la plej mallonga taglumo daŭras nur 5 horojn. En Torneo (Finnlando) oni havas je la 21-a de junio dum 22 horoj taglumon, k je la 25-a de decembro nur 3 horojn. En Novjorko la plej longa taglumo de la jaro daŭras 15 horojn k en Vardae (Norvegio) de la 21-a de majo ĝis la 22-a de junio, do unu monaton sen interrompo. *Trad. E. Pohlig.*

Ĉiu, kiu volas havi valoran dokumentaron pri kultura agado k celado en Sovetio,
aĉetu la novan SAT-broŝuron

SOVETA PEDAGOGIO
Multaj interesaj artikoloj de aŭtoritataj gvidantoj. **40 pĝ. Form. 16 × 25 cm.**
Prezo 0,50 mk. g.
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

3. 6. Ne uzi antikvan t. n. roman ciferaron (I, II, III, IV ...). Ĝi estas konfuziga, primitiva k malperfekta. Al ĝi inklinas pastraĉoj mezepokemaj k sciencistoj malnovemaj. T. n. hindo-araba ciferaro estas pli perfekta, ĉar simpla, oportuna k sufiĉa por ĉiuj bezonoj de nombrado k numerado. Por numerado anstataŭ artifikaj diversnaciaj alfabetoj k romaj ciferoj uzu ordinarajn ciferojn kun punktoj aŭ apostrofoj inter ili, kiel montras jenaj ekzemploj: *2'7* montras sepan subĉapitron el dua ĉapitro, *2'7'5* montras kvinan punkton de sepa subĉapitro el dua ĉapitro ktp. Ekonomio, kiu regas la mondon, postulas simplon k ordon en nia signaro k niaj antikviĝintaj gustoj devas cedi antaŭ la postulo. Pro la samaj motivoj ne uzu antikvajn (ekleziajn, gotikajn k. s.) litertipojn.

3. 7. Nunaj sintaksaj signoj de disfrazigo (. , ; — ...) restas sen ŝanĝo k perfektigo de la tempo de mezepokaj presistoj Municioj (15. jarcento).

Oni povas perfektigi la signojn jene: anstataŭ blindiga punkto en fino de frazo uzi vertikalan strekon.

Anstataŭ komo uzi la signon + kiam ripetiĝas samspecaj frazoj aŭ epitetoj. Punkto restu nur por montri mallongigon de vortoj. Jen estas frazoj por ekzemple montri la uzon de punkto, streko, pluso k komo: *simpligu alfabeton + samtipigu skrib' k' presliterojn + enkonduku signojn, kiuj montros esprimon de voĉo, ĝian emoc. signifon | la skribo iĝos pro tio pli konciza k simbola + la okulo pli facile k rapide kaptos ĝin + la penso pli facile k rapide orientiĝos en ĝi | ĉi reformo havos grandan ekonom. k kultur. signifon |*

4. En nomsistemoj

4. 1. Antaŭ ĉio esperantigi plejmulte uzatajn nomojn de tutmonde konataj famuloj k geografinomojn kiel ĝin faris por propra uzo ĉiuj nacilingvoj (Arĥimedo, Neŭtono, Ŝekspiro, Marks; Novjorko, Parizo, Moskvo, Monto Blanka, Meztermaro ...). Sennaciigo aŭ kripligo (kiel diras burĝoj) de nacia ortografio k prononco estas dezirinda k neevitebla. Per sola esperanta alfabeto oni ne povas transdoni malekonomian (k ofte sovaĝan) multon da ĉiuj naciaj sonnuancoj (vidu la paragrafon 3'1 de ĉi tiuj taskoj). Esperantigante la nomojn atenti ilian sennacian karakteron, ne uzi la vortojn kun la antaŭvorto *trans* (*Transkaŭkazio* k. s.) — kio estas *trans io* por rusoj, tio estas *antaŭ io* por persoj k turkoj. Same rilate al la vorto *Oriento.* Preferindaj estu la nomoj *Sudkaŭkazio, Nordkaŭkazio, Ĉebajkalio* k. s.

Esperantigante la ortografion, nepre atenti lingvan ordon k ekonomion, eviti *superfluajn* novajn radikojn sekvante regulojn de esperanta vortfarado k spiriton de Fundamento. Ekz., se bazradiko estas *ruso,* la derivaĵo devas esti *Rusio,* ne naciigita *Rosio*; se estas *Novosibirsk* kun akcentata *i,* devas esti *Sibirio* (laŭorigina), ne sensprite "internaciigita" regulrompanta *Siberio* (la ĉeesto de tri *i* en la vorto Sibirio ne povas esti pli malrekomendinda ol kvar *i* en la vorto *plisimpligi*). (Daŭrigota.)

TAGO EL MIA VIVO

Mi estas 21-jara fraŭlo k loĝas en Kazatino, malgranda urbeto de l' Kieva gubernio (Sovetio). Ĝi kuŝas for de Kievo 149 kilometrojn. Mi estas senlaborulo, ĉar trovi laboron en mia urbo ne estas facile. Post fino de lernado en mezlernejo mi troviĝas hejme. Pro multaj cirkonstancoj, ĉefe pro la zorgado, kiun mi havas pri 8-jara frato, mi ne povas veturi en alian urbon por daŭrigi mian lernadon, sed laboras eksterhejme. Miaj vivrimedoj ne estas grandaj; ili atingas ĝis 50—60 rubl. monate (mi posedas domon per heredo). Mia tago pasas jene:

Post ellitiĝo je la 7-a horo mi faras ordon en mia ĉambro ĝis la 8-a. Kiam ellitiĝas mia frato, ni matenmanĝas k post tio mi instruas lin ruse k iomete esperante. Tio daŭras ĝis la 12-a horo. De la 12-a ĝis 15-a mi lernadas eksterhejme laŭ speciala kurso "La popola universitato hejme" k perfektigas min en eksterlandaj lingvoj (germana, franca, angla k. a.), ĉar mi elektis vojon esti lingvisto. Je la 16-a okazas nia tagmanĝo. En la sekvantaj horoj ĝis vespero mi estas libera. Dum tiu tempo mi respondas al leteroj ricevitaj el la tuta mondo; poste mi legas "S-ulo"n, diversajn librojn. Nuntempe mi analizas verkojn de Lenin, skribas iomete artikolojn pri filatelio, ĉar mi estas kunlaboranto al multaj ĵurnaloj de filatelia gazetaro. Inter la 20-a k 21-a mi iras somere en fervojan ĝardenon. vintre mi pasigas la tempon en fervojlaborista klubo k teatro de Centra Laborista Klubo. Ĉi tiu klubo estas bona, eĉ komforta: tie oni povas ludi ŝakon, damon, dominon ktp., povas legi novajn gazetojn k aŭskulti radion. En la urbo ankaŭ estas laboristaj kluboj, sed ilin ne malsuperas la fervojista klubo. Kazatino, en fervoja rilato, ludas grandan rolon, kiel, fervojkruciĝa stacio. Ankaŭ en la urbo estas ŝtata kinejo, kiun mi ofte vizitas. Ĉiuvespere mi aliras la stacidomon por elekti mian korespondadon k presaĵojn. Alveninte hejmen mi tralegas unue la gazeton *Pravda* (Vero), organo de C. K. de rusa komunista partio, trarigardas presaĵojn k ricevitajn korespondaĵojn. Je la 24-a mi preskaŭ ĉiam enlitiĝas. Ĉiudimanĉe mi partoprenas kiel gvidanto novorganizitan rondeton de esperanto ĉe Centra Klubo. Sed estas nur malmultaj, kiuj interesiĝas pri nia lingvo. Tiel pasas la tagoj de mia vivo.

V. Fedorovski (13 059).

Kiel mi fariĝis vegetarano

En jaro 1910, estante malsanema kaj nervema, mi foje en kuirejo estis atentigata de mia patrino je krueleco, kun kiu oni senŝeligis vivantan fiŝon. Dum la tagmanĝo mi deklaris al mia patrino, ke mi plu ne manĝos fiŝon. Je ŝia protesto dank' al timo pri mia sano kaj je diro: "tre multe da nutraĵoj oni akiras per mortigo", mi firme deklaris, ke plu nenian mortigitaĵon mi manĝos. Ne helpis ankaŭ la deklaro de tri min kuracantaj kuracistoj, ke mi mortos, se mi ne manĝos viandon. Mi loĝis en la provinco, kie forestis vegetaranoj. Jen nun post 19 jaroj mi ne nur ne mortis estante vegetarano, sed male mortis multaj miaj malsanoj. Dum la jaroj 1919—22 mi estis ruĝarmeano. En la ruĝa armeo mi estis ankaŭ severa vegetarano, kaj malgraŭ tio mi sentis min sufiĉe bone. De vidpunkto etika (socieduka), higiena, sociekonomia mi opinias la vegetarismon koniginda al la proletaro.

SAT-ano 1896.



DISKUTEJO

"La higienaj ordonoj konsistigas per si mem tutan moralon"

(Respondo al artikolo en "S-ulo" n-o 272)

Kiam iu homo, eĉ kontraŭulo de nia tendenco, diras ion pravan, ni aprobu lin. D-ro Herikur' diris tre prave: "*Higieno mem estas tuta moralo*". Ni aprobu. Sed ĉar d-ro Herikur' estas burĝo, ni montru al li, ke la politiko de liaj amikoj ne plenumas, malplenumas tiun moralon: higienon.

En nia 20-a jarcento oni scias, ke preskaŭ ĉiuj malsanoj estas epidemiaj aŭ infektaj. Do higieno-moralo ordonas detrui kvartalojn da domaĉoj, forigi malsanigajn metodojn de laboro, forigi kutimaĉojn, en kiuj precipe laboristaro, duone pro mizero, duone pro senklero, suferas ftizon, sifilison, kanceron ktp. Eĉ loĝantoj de belaj sanigaj kvartaloj suferos la samajn malsanojn tiom longe, kiom ekzistos mizeraj kvartaloj, mizeraj labormetodoj, mizera senklero. Riĉuloj heredas kun riĉoj specialajn riĉulajn malsanojn, kiujn naskas tromanĝado k drinkado.

Elegantula drinkado (ekzemple per "koktejloj") estas nun pli grava ol laborista drinkado.

Nur senriĉigante ilin, niajn frataĉojn la burĝojn, ni liberigos ilin k homaron de "burĝaj malsanoj". Sifiliso k blenoragio estas ankaŭ precipe burĝaj malsanoj, ĉar precipe studentoj k riĉuloj uzas prostituinojn (almenaŭ en Francio, Anglio, Germanio).

Higieno estas *moralo*, ankaŭ *komunisma moralo:* ĝis ĉiuj homoj kuraciĝos k fariĝos sanaj (eĉ animaloj ĉirkaŭ ni), ĉiuj suferos, eĉ privilegiuloj, pro la komunaj malsanoj. Komuna estas epidemio. *Nur komuna estos SANO.*

Jen terura natura justo, terura, sed ne senespera. Burĝoj ĝuas san-privilegiojn nuntempe. Sed ilia klasa privilegia sano mem estas ege pli malcerta, ol sano en socialisma ŝtato. Burĝoj *promesas* flegi tion k ne flegas ĝin, ili *ne povas flegi ĝin,* dum daŭras kapitalismo, kiun ili subtenas. Ni scias, ke nur plena socialismo kuracos (estos longa laboro!) ĉiujn homajn korpajn k spiritajn malsanojn. En belega letero al H. Barbus, kiun ni legis en "*Monde*", kaŭkaza kamparano antaŭvidis tempon, kiam homoj mortos preskaŭ nur plenaĝaj pro natura eluziĝo. (Tiu letero temis pri 140-jara maljunulo, kiu vivas en Kaŭkaza Sovetio, jam tiel, kiel antaŭvidas nia K-do, sen malsanoj, malrapide eluziĝante.)

Nur plena socialismo celas al moralo, al sensuperstiĉa scienca moralo: *higieno tuthoma.*

Kiam kleruloj kiel d-ro Herikur' prave aludas tion, ni aplaŭdu ilian pravan diron: "Do, burĝo! Vi diris veron. Higieno estas tuta moralo. Kion faras burĝaro por ĝin plenumi?"

Jief.

Pri "niaj problemoj" k fidindo de la informoj

En n-o 263 de "S-ulo" troviĝis artikolo "Niaj problemoj", en kiu estas dirite, ke ni devas interŝanĝi ankaŭ niajn malsamajn ideojn. Se ni trarigardas nian gazeton, ni devas konstati, ke oni povas legi kelkfoje pri la sama afero malsamajn raportojn. Ekzemple komunisto prijuĝas la saman aferon tute aliel kiel eble socialdemokrato. Pro tio K-do *Leono* proponas, ke la verkantoj aldonu la subskribon "verkita laŭ . . . a vidpunkto". Tiu ĉi propono estas diskutinda. Sed tia subskribo ne pravigas la malsamajn raportojn pri iu ajn afero. Mi volas citi jenan fakton: En n-o 274 troviĝas artikolo: "Sindikata movado en Germanio." En ĝi estas dirite: "Meznombra labortempo semajna estas 48 horoj, do ĉiutage 8 horoj. En la sekvinta n-o troviĝas artikolo "Germanio super ĉio", en kiu estas dirite: "1 miliono (nuntempe preskaŭ 2 milionoj) estas ĉiam senlaboraj. 2 pliaj milionoj ne havas plenan okupon. La cetera parto de la laboristoj laboras *10—13* horojn tage. Do en du artikoloj du diversaj raportoj. Ĉu oni nun povas pravigi tiun ĉi diversopiniecon per la citita subskribo? Mi ne kredas. Laŭ mia opinio oni devas raporti vere objektive k ne laŭ la tendenco de sia mondkoncepto. Aliokaze ne povas havigi al si veran bildon pri situacio tiuj ĉi K-doj, kiuj ne estas samlandanoj de la raportintoj.

Verkita laŭ SAT-ana vidpunkto *Gross (1899).*

Atentigo! K-doj metu sur siaj leteroj al la Redakcio ĉiam siajn nomon k adreson!

Esperanto-Servo

N-o 21 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 20. Februaro 1930

EL LATVIO

Danĝero por politikaj rifuĝintoj

144 (Esp.-Servo.) La latvia registaro, kvankam ĝi ne konsentas esti nomata faŝista, ĉiel helpemas al litovia faŝistaro rilate persekutadon de politikaj elmigrintoj. Post faŝista renverso en Litovio multaj socialistoj forkuris Latvion. Sed nun la registaro ne konsentas ilian plilongdaŭran restadon — kion afable eĉ permesis pola registaro. Do, la malfeliĉaj rifuĝintoj devis ree iri Polion. Sed antaŭ nelonge nia registaro faris tre malestimindan paŝon: ĝi fordonis arestitan litovan socialdemokraton Misiulis al litovia juĝistaro, pretekstante ke li estas krimulo, kiu dum sia forkuro pafmortis litovan policanon. Onidire la litovia registaro juĝos Misiulis kiel politikulon k, verŝajne, mortkondamnos lin . . .! *?*

EL POLIO

Malliberejoj k malliberuloj en Polio

145 (Esp.-Servo.) En Polio estas nun 333 malliberejoj kun entute 36 667 "loĝlokoj". Meza kvanto de l' "loĝantaro" estas 27 000. *C. G.*

Pri la faŝista juĝejo en Polio

146 (Esp.-Servo.) La 23-an de januaro okazis en Kielc proceso kontraŭ ses politikaj malliberuloj, kiuj estas kondamnitaj al 18-jara mallibero. Inter la politik-malliberuloj estis K-do, kiu freneziĝis pro bestaj turmentadoj, kiuj estis aplikataj dum "esplorado" en policejo. La ceteraj K-doj postulis lian transporton al hospitalo, kion la mallibereja estro simple rifuzis. Kaŭze de tio ĉiuj K-doj solidariĝis k ekmalsatstrikis. Nun venis en la ĉelon iu M. Najman, kiu elpoŝigis revolveron k senkaŭze pafis en la koron de K-do B. Paĥel. Li kelkfoje ripetis la pafojn k la viktimo morte falis teren. La enterigo okazis meznokte pro timo, ke formiĝus manifestacio. Proksimiĝas tamen la tago de l' proletara venko! *S. A. K.*

Ses-taga proceso en Kielc

147 (Esp.-Servo.) La 6-an de februaro finiĝis proceso en Kielc. Sur benko por akuzatoj sidis 23 Gek-doj, en aĝo de 17—30 jaroj. Ili ĉiuj estis akuzataj pro komunista agado k arestitaj la 25-an de aprilo pasint-jare! En la proceso akuzitoj rakontis pri suferoj k turmentadoj dum "esplorado" en policejo. Unu rakontis: Manoj k piedoj estis enŝraŭbitaj en premilon, en la nazon la fiagentoj enverŝis bolantan akvon. Alia rakontas: Oni ligis liajn manojn k piedojn kune, interŝovis bastonegon k tordis lin kiel karuselon. Spite nesufiĉaj argumentoj k la defendo de l' plej fama advokato, la faŝista reĝimo devis satigi sin k plej severe punis ilin: 4 po 6, 8 po 4, 1 po 5, 4 po 3, 2 po 2 k 2 po 1 jaroj da malliberejo; entute la verdikto do kondamnas al 79 jaroj da mallibero. La faŝista reĝimo de Pilsudski intencas per tiaj rimedoj malfortigi la proletaron; sed evidentiĝas, ke male ĝi nur hardiĝas por la finbatalo k venko . . .! *S. A. K.*

EL RUMANIO

Klas-konsciulo antaŭ tribunalo

148 (Esp.-Servo.) En lastaj tagoj de januaro okazis proceso en urbo Baki, kie prokuroro demandis unu el la akuzitoj pro partopreno ĉe malpermesita manifestacio, de kie li ricevis ruĝan standardon. Li respondis: de la kom. junularo k partio. Al demando, kie nun estas la standardo, la kuraĝa K-do respondis: tio ja estas mia afero. Kiam la advokato diris, ke ili pro juneco agis nekonscie, la akuzitaj K-doj eksaltis k diris: ne, ni agis plenkonscie, ja la 7-a de novembro, kiam ni manifestaciis, estas la liberig-tago de la rusaj proletoj k Sovetio estas nun la lando de l' tutmonda Proletaro k ekspluatitaro. La 3 akuzitaj K-doj malkaŝe deklaris siajn devizojn. Pro provo, perforte renversi la kadukan kapitalismon, ili estis kondamnitaj al 10—15 tagoj da malliberejo. *Role.*

EL USONO

Pri la blanka teroro

149 (Esp.-Servo.) S. Zinich, redaktoro de la jugoslava komunista gazeto "Radnik" en Ĉikago en lastaj tagoj de januaro estis arestata. Nun oni lin ekzilos kune kun krimuloj. La jugoslavaj faŝistoj longtempe intense agadis kontraŭ la komunista gazeto "Radnik" k provis ekzili la revoluciajn gvidantojn. Tiu ĉi atako estas parto de la ĝenerala plifortiĝanta teroro de l' kapitalistoj kontraŭ la komunista movado. Antaŭ nelonge oni arestis multajn gvidantojn de la distrikto k provis peli la movadon "subteren", kio tamen ne sukcesis. K-do Zinich nun atendas sur *Ellis Islando,* esti sendata al la blankterora lando Jugoslavio. Tio signifus por li multjarajn torturojn en malliberejo k eble morton. La Internacia Ruĝa Helpo prizorgas lian defendon k akcelas ke li estu sendata Sovetion. Per ekzilo de laboristoj naskitaj eksterlande, kiuj estas aktivaj en la pliakriĝanta klasbatalado, la kapitalistoj en Usono pensas, ke ili povas haltigi la revolucian movadon — sed neniam! Tio nur pli-rapidigos ilian propran falon! Centoj da revoluciaj laboristoj estis deportataj ĉiujare, sed nun tiu afero estas pli grava ol iam antaŭe. Preskaŭ unu vorto estas sufiĉa kaŭzo, por ke la "leĝo enmigrula" estos uzata. Sed malgraŭ tio la klasbatalo daŭros, jes, pli forta, ĝis la venko de la Proletaro! *V. M., Usono.*

EL FRANCIO

Averto al senlaboruloj blanklandaj

150 (Esp.-Servo.) En Orléans-Francio estas elektra motor-fabriko, nomita CGE (ĝenerala elektra kompanio), kie laboras pli ol mil da gelaboristoj. La mastraro preferas dungi fremdajn laboristojn, de kiuj ĝi eltiras pli da profitpartoj. Ĉeĥa K-do raportis al mi faktojn, kiuj okazas ofte al fremduloj. En Praha estas "ĉeĥoslovaka societo por koloniado" (!), kies celo estas varbi laboristojn por Francio. Koncerna K-do estis varbita de tiu societo, k en lia persona kontrakto mi legis: Kiel interakordigisto (li kunĝustigas diversajn metalpecojn) li gajnas 3,50 fr. po horo aŭ 28 fr. po tago je 8-hora laboro. La salajro popece povas atingi 30—40—50 fr. tage — laŭ lerteco. La nutrado kostas ĉ. 8.25 fr. tage en la fabrika manĝejo. La fabriko luas dormejon (en militligna barako) po 1,25 tage. Okaze de malsano la dungito rajtas ricevi senpagan flegadon, k por tio li pagas 3 fr. semajne al la fabrika asekur-societo. La vojaĝprezo de Ĉeĥio ĝis Orléans estas pagita de la dungito, sed la societo antaŭpagas ĝin, kiun li poparte ĉiusemajne devas repagi. La reira vojaĝo estos pagita de la fabriko nur okaze de malsano. — Jen la ĉefaj punktoj el la kontrakto. Bona afero sur papero, sed reale ĝi estas tute aliel. Lia salajro estas nur 3 fr. hore. Pri ĝi estas 3 ŝtupoj: 1. la dungito scias francan lingvon; 2. li iom ĝin komprenas; 3. li ĝin tute ne komprenas. Tiuj ŝtupoj, krom kontrakto, ne estas pro lingvoscio, sed nur por dividi la laboristojn k okazigi malamon inter ili. Pri nutrado la prezo estas bona, se oni intencas malsati, ĉar pano kostas 2 fr. po kg., bovaĵo 7—12 fr. po ½ kg., kafo 10—12 fr. ½ kg., sukero 4.30 fr. 1 kg., butero 12 fr. ½ kg., lakto 1.60 fr. po litro, ovo 1 fr. po peco. *Pri dormejo:* Pluvo falas tra la ligna tegmento. En la urbo ĉambreto kostas 100—150 fr. monate. *Pri malsano:* Oni estas flegata kiel soldato en kapitalistaj landoj. — *Resume:* La vivo estas tute aliel, ol imagas al si enmigrantoj. Laciga laboro por malsat-salajro, k se li postulas kontraktvalidiĝon, oni tuj maldungos lin. Kion fari sen mono en la poŝo por reiri al gepatra lando — do estas unu pli en la vicoj de malsatuloj. Ho, K-doj! Restu en viaj landoj, ĉar ĉi tie vi iĝos mezepokaj soldatoj k vi konatiĝos kun malsato k morala sufero. *8361, Orléans.*

SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Rudolph-Herrmann-Str. 7, ptr. r. (Germ.)

AŬSTRIA LABORISTA SPORTO EN 1929

La Laborista Asocio por Sporto kaj Korpokulturo de Aŭstrio (Askö) raportas en koncizaj trajtoj pri la plej gravaj okazintaĵoj de la pasinta jaro.

En Malsupra Aŭstrio kaj en Burgenlando estis fondataj landokarteloj. "Askö" estonte estos reprezentata ĉe la parti-tago de la Socialdemokrata Partio per sep delegitoj. La Viena landokartelo sendos sep delegitojn al la Viena konferenco de la socialdemokrataro. Ĉe la balotoj por la komunumaj parlamentoj en Malsupra Aŭstrio multaj laboristaj sportuloj estis elektataj kiel komunumaj konsilantoj.

La vintrosporto bone disvolviĝas. Glacihokeo estis nove enkondukata. Ses ski-saltredutoj estis konstruataj. Vintrosportan aranĝon de la Vienaj defendsportuloj partoprenis pli ol 700 skiuloj.

La sportkuracista kontrolejo ricevis Rentgen - aparaton. Laborista Akvo-Savo-Servo estis starigata kaj jam montras bonajn sukcesojn. La Askö ricevis permeson, gvidi privatan lernejon por korpekzercoj. Laborkomunumo de sportoratoroj laboras pri la teoria bazigo de la laborista sporto. La nove starigita virinkomitato de Askö estas ellaborinta programon por la virina sporto, kiu kun kelkaj malgravaj ŝanĝoj flanke de la kongreso de la Socialista Sport - Internacio Laborista (SSIL) en Praha estis akceptata por la Internacio. En la Asködomo en Vieno malfermiĝis trapasnoktejo por migrantaj junulsportuloj. La Naturamikoj akiris al la turista trafiko kelkajn kabanojn en la montaro, inter ili la *Karl-Volkert*-domon je la strato de la Glockner-monto.

Tri organizoj, la aŭstria Laborista Atleta Asocio, la Libera Atleta Unuiĝo kaj la Ĝiu-Ĝicu-Klubo kuniĝis al Asocio de la Laboristaj Fortosportunuiĝoj. La kunigo de aliaj asocioj estas alcelata. Al Nederlando, Germanio, Svisio kaj Ĉeĥoslovakio estis sendataj sportdelegitaroj, kiuj atingis tre bonajn sportajn sukcesojn. La internacia junular-renkontiĝo socialista en Vieno same staris sub la signo de internacia sporta solidaro. La Oficejo de la Socialista Sport-Internacio Laborista konferencis dufoje en Vieno kaj akceptis decidojn por la 2. Olimpio Laborista en 1931.

La revuo "Volkssport" (popolsporto) zorgis pri la publikigo de la decidoj de Askö kaj pritraktis la problemojn de la laborista sporto. En la jaro 1929 festis la jubileon de sia ekzisto: Askö — la dekjaran, la Laborista Biciklula Asocio — sian 30-jaran, la Viena Laborista Gimnastunuiĝo — sian dekjaran, la Viena Naĝunuiĝo — sian 20-jaran, la Gildo de la Alpinistoj kaj la Junular-sekcio de la Naturamikoj — la jubileojn de sia dekjara ekzisto. La jaro 1929 estis la 37-a jaro de aŭtonomia laborista sportmovado en Aŭstrio.

Ĉi tiu mallonga bilanco pri la agado interne de Askö montras la gravan kulturan kaj organizan signifon de la aŭstria laborista sportmovado.

LABORISTA GIMNASTMOVADO ĈEĤOSLOVAKA EN 1929

La Laborista Gimnastasocio de Ĉeĥoslovakio, membro de la Socialista Sport-Internacio Laborista, montras en sia ĵus eldonita statistiko pri la jaro 1929 denovan supreniron de sia membraro kaj nombro da gimnastunuiĝoj. Ĝi kunigas en si 1103 unuiĝojn kun 109 085 membroj. Inter ili estas 44 094 viroj, 14 639 virinoj, 8 149 junuloj, 7 082 junulinoj, 17 363 lernantoj, kaj 17 639 lernantinoj. La plej grandan kreskon havas la gelernantoj kaj la plenaĝaj membroj. Organizitaj estas sindikate (profunuiĝe) 26 008 membroj, politike en la Socialdemokrata Partio 26 031, kooperative 16 190. La plej fortan membraron denove havas la unuiĝo Praha XI, en kies gimnastejo okazis la "akademio" honore al la pasintjara kongreso de SSIL. Ĝi havas 1 301 membrojn. Al ĝi sekvas Plzen II kun 950 membroj.

El la sportsekcioj estis aktivaj 143 dromsportaj sekcioj, 210 manpilksekcioj (kresko je 32) 24 folaj-pilko[1]-sekcioj kaj 9 naĝsekcioj. La sanoservon plenumis en la asocio 684 gesanitaristoj. La tutposedo de la unuiĝoj kalkuliĝas je 14 500 000 da kr. ĉ. Resume: la movado marŝas!

GRANDAJ ARANĜOJ DE LA SSIL-ASOCIOJ EN 1930

Dum la kuranta jaro la asocioj de la Socialista Sport-Internacio Laborista plenumas multajn grandajn aranĝojn, kiuj servu al la preparo kaj kiel envojigo al la 2. Olimpio Laborista 1931 en Vieno. Ĉi-sence ankaŭ trovis sian plenumon la *Vintrosporta Festo de la german-ĉeĥaj Laborista Gimnast- kaj Sportasocio (sidejo Aŭsig)* en la metalmontaro. Multaj saksaj laboristaj vintrosportuloj reprezentis per sia partopreno la internaciecon ĉe tiu ĉi aranĝo.

La rondon de la grandaj someraj aranĝoj malfermos la hungaraj lab. sportuloj per *Laborista Sportfesto en Budapest je la 31. majo ĝis 1. junio.* La programo projektas: amasan gimnastadon, gimnastikon kaj la hungarajn majstrecojn en dromsporto kaj en luktado. La *Svisa Laborista Asocia Gimnast- kaj Sportfesto* estas anoncita por la fino de junio al Araŭ. La ĉefa festtago estos la 29. junio. Ĉar la Svisa Lab. Gimnast- kaj Sportasocio estas centra asocio, estos praktikataj ĉiuj specoj de la korpekzercoj en Araŭ. La *Laborista Gimnastasocio de Ĉeĥoslovakio* preparas la 26.—29. junio en Praha *Gimnast- kaj Sportfeston de la ĉeĥa lab. junularo.* Dromsportaj konkuroj, pilkludoj, prezenta gimnastado, tendaro de vojotrovantoj kaj granda almarŝo en la stratoj de Praha estas intencataj. En interligo kun la tuta aranĝo okazos ekspozicio: "Vivo kaj Laboro de la Lab. Junularo."

Grandajn preparojn ankaŭ faras la *german-ĉeĥa Lab. Gimnast- kaj Sportasocio* por sia *2. Asoci-festo de la 4. ĝis 6. julio en Aŭsig.* La festprogramo enhavas konkurojn en gimnastado, naĝo, lukto, dromsporto kaj ŝako, amasajn liber-ekzercojn de infanoj kaj plenkreskuloj, amas-dancojn, amasajn rond-bicikladon de la lab. bicikluloj, grandajn almarŝojn, parolĥoron, festludon kaj torĉan manifestacion.

La *Sport- kaj Gardasocio de Latvio* festos sian *6. Lab. Sportfeston de la 30. julio ĝis 3. aŭg. en Rigo.* La prezidanto de latvia respubliko malfermos ĉi tiun aranĝon per soleno en la ŝtata opero. La ruĝaj pioniroj prezentos scenojn el sia tendaro. Konkuroj okazos en dromsporto, piedpilko, manpilko, gimnasto, biciklado, defendsporto, pafado kun etkalibraj pafiloj, bokso, lukto kaj naĝo. Krom tio la programo montras festludon, torĉan manifestacion kaj specialan adiaŭan solenon por la eksterlandaj gastoj.

La *belgia Lab. Sportasocio* okazigos de la *14.—18. aŭg. en Lieĝo (Liège) preparan aranĝon por la 2. Olimpio Laborista 1931 en Vieno.* La delongaj preparoj esperigas bonegan sukceson. Lieĝo estas urbo de 170 000 loĝantoj, kun grandaj industriaj konstruoj kaj absoluta socialista plimulto en la komunuma parlamento. Programo de la aranĝo projektas internaciajn konkurojn en gimnastiko, piedpilko, atletiko, akvosporto, biciklado, manpilka ludo kaj teniso.

Krom la cititaj asociaj aranĝoj okazos granda nombro da gravaj internaciaj renkontiĝoj sur la plej diversaj sportkampoj. En neniu okazo estas alcelata la atingo de sportaj rekordoj, sed oni celas konfesi la internacian solidaron de la lab. sportuloj, kaj montri ke la agado en la lab. sporto estas servo je la laborista klaso.

[1] Angle: Volley-bol.

Ĉi tiuj raportoj estas ĉerpitaj el la sporta gazetservo de la Socialista Sport-Internacio Laborista (SSIL), kiu aperas esperantlingve.

TRA ESPERANTIO

ĈU ESPERANTA ALFABETO POVAS ESTI AKCEPTATA KIEL INTERNACIA?

En multaj landoj oni parolas pri enkonduko de nova latina alfabeto. En orientaj landoj oni jam uzas tian novan alfabeton. En Ĉinio k Japanio estas tre fortaj tendencoj nuligi japanan malnovan alfabeton k anstataŭigi ĝin per pli oportuna latina. En Germanio oni jam pli k pli uzas latinan alfabeton ol gotikan.

En kelkaj landoj oni iom post iom akceptas la latinan alfabeton. Ekz. en serba lingvo oni uzas krom kirilaj literoj ankaŭ latinajn. Eĉ en Sovetio oni parolas pri enkonduko de latina alfabeto. Blankrusoj havas *du* alfabetojn, latinan k kirilan.

Sed ĉu enkondukante la latinan alfabeton oni solvas la demandon? Eĉ sciante ĝin oni ne povas legi diversnaciajn tekstojn. Kial? Ĉar en diversaj lingvoj saman literon oni prononcas diversmaniere. Ankaŭ por esprimi iun saman sonon oni uzas en diversaj lingvoj diversajn literojn. Ni prenu ekzemplon: litero "C" estas prononcata kiel "tz", "tc", kiel "k", kiel "s", kiel "ĉ", kiel "dĵ". Eĉ ofte en unu lingvo ĝi estas prononcata diversmaniere.

Samon ni vidas dum la esprimado de sonoj. Ekz. sonon "ŝ" oni esprimas per *literoj:* sh (angloj); sch (germanoj); ch (francoj); sj (skandinavoj); x (katalunoj); s (hungaroj), ss (rumanoj); sz (poloj); s, (uzbekoj); s (ĉeĥoj), t (angloj, fine de vortoj), s (germana, antaŭ *p* k *t*); ш en rusa. Aliaj skribsignoj por tiu sono ekzistas en ĉina, hebrea, internaci-fonetika, egipta, araba k slava. Ĉu vi ne vidas, kiel malracie estis kreataj alfabetoj? Starigo de unuigita alfabeto estos paŝo al pliaj faciligoj en interrilatoj. Ĝi estos paŝo al komuna internacia lingvo.

En tiu natura procezo devas eniri esp-o k helpi plirapidigi tiun procezon. Esp-a alfabeto, kiel sinteza, povas esti aplikata kiel internacia. Kiel ĉiam ni havos kontraŭdirojn. Ekprotestos K-doj, ekz. germanaj, k diros proksimume jenon: "Ni havas en nia alfabeto literojn, kiuj forestas en esp-a alfabeto, ekz. *ä, ö, ü, qu,* k. a. Kion do fari?" Samajn protestojn ni aŭdos de kelkaj aliaj popoloj, ekz. angloj, japanoj k. a.

Necesas do aldoni por kelkaj popoloj kelkajn literojn al esp-a alfabeto. Mi havas folieton de Universala Skriba Asocio, kiu aplikas esp. alfabeton por la germana lingvo. Oni enkondukis ö, ä, ü por germanoj, same y, x, w, q. Nur jenaj reguloj devas esti atentataj: Por unu sono — unu litero; por unu litero — unu sono; skribu fonetike, kiel vi parolas; ne trograndigu la alfabeton universalan.


Aperos protesto pro supersignoj. Sed esp-aj supersignoj estas tre rimarkindaj k al supersignoj jam alkutimiĝis multaj popoloj. Mi havas tabelon komparan de ĉiuj alfabetoj (nepreseblan en "S-ulo"), k laŭ tiu tabelo evidentiĝas, ke esp. alfabeto povas esti akceptata kiel internacia.

Ĉu mia projekto estas io eksterordinara? Ne. Jam ekzistas kelkaj projektoj de internacia skribo, ekz. internacia scienca alfabeto, intern. fonetika skribo, projekto de Ciolkovski, de Ĉeĥiŝin k. a. SAT-anoj devas propagandi alfabeton esp-an kiel plej taŭgan por unuigita latina alfabeto. Ĝia enkonduko faros revolucion en la lingvoj; disfalos tiam la lingvaj baroj.

D. Snejko.

La 8-a Asoci-tago de Laborista Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj

okazos de la 18-a ĝis la 21-a de aprilo 1930 (Pasko) en Essen (Ruhrregiono). La kongresejo estas la "Urba Salonaro", kiu jam vidis multajn kongresojn k kunvenojn laboristajn. Jam nun oni povas diri, ke tiu kongreso fariĝos gravega por la tuta laborista esp.-movado. Sufiĉe granda kvanto da proponoj jam estas starigita.



La "Krupp"-salono en la Urba Salonaro Essen Kongresejo de la 8-a LEA-asocitago por germl. regionoj

Sed la kongreso certe ankaŭ havos propagandan efikon, ĉar samtempe kun ĝi okazos en Essen "Granda Laborista Kultur-Varb-Semajno" kun ekspozicio, nomita "ARKULA" (*Ar*beiter-*Kul*tur-*A*usstellung = Laborista Kultur-Ekspozicio). Ĉi tiun Varbsemajnon k Ekspozicion aranĝas jenaj organizoj:

Asocio de Proletaj Liberpensuloj por Rejnlando-Vestfalio, Ruĝa Helpo, Internacia Lab. Helpo, Internacia Asocio de la viktimoj de l' milito k de l' laboro, Lab. Sportkartelo (kun ĉiuj diversspecaj sportgrupoj) Batalunuiĝo por prol. lernejpolitiko, Ligo por gardo de la patrino k socia familihigieno (aliĝinta al la mondligo por seksa reformo), Asocio de prol.-revoluciaj verkistoj, Marksista lab. lernejo, Essen, Lab. Radio, Ŝak, Stenografa, Sanitarista, Mandolinista, Kantista ("Popolĥoro"), Foto-Amatora, Esp. Asocioj.

Krom la ekspozicio mem, okazos en la tempo de 12-a ĝis 21-a de aprilo paroladoj (i. a. pri la kulturbatalo en Sovetio, pri la seksa demando (d-ro M. Hirŝfeld) k pri aliaj gravaj temoj) sportprezentoj; Vivanta Ŝakludo (Kapitalo k Laboro); kant- k instrumentkoncertoj, lekcio de lab. verkisto; agit/prop. teatraĵoj k kiel krono de l' tuta entrepreno je la fino — la Laborista Esperanto Kongreso[1].

Ĉiu povas imagi al si, ke la "Essen-a Kultur-Semajno" elvokos grandan eĥon en la germana, k kun helpo de la tutmovado esp-istaro en la internacia lab. kultur-movado. Ĉiu K-do do legu atente nian anoncon en ĉi tiu n-o kun la peto, sendi ekspozician materialon por supre nomitaj organizoj. Ni esperas, ke en sekvontaj semajnoj la sendaĵoj el la tuta mondo alfluos. Ili pruvu, ke fakte esp-o estas taŭga ilo por la tutmonda proletaro, por ĝia batalo, starigi pli bonan kulturon, pli bonan mondordon ol la putranta burĝ-kapitalisma — la socialismon.

La Kongres-Komitato
de l' 8-a LEA-Asoci-tago, Essen.
Komisiite: W. Stertzenbach (4567).

[1] Eble parto de la kongreso estos disaŭdigota per la sendstacio Langenberg.

Korektoj. En n-o 279 bonvolu fari jenan gravan korekton: La titolo sur paĝo 217 devas esti: Pensoj *de* Lenin (ne *pri!*). Ni ne povas kompreni, kiel okazis tia fuŝo! Temas pri traduko de tekstoj el verko de Lenin: "Infanmalsanoj". — Sur pĝ. 215, 3-a kol., lin. 18 de supre, bonv. aldoni "rusaj blankuloj" antaŭ la vorto "fiksiĝis".

Esperanto ĉe la finna soc. dem. partio

La partia kongreso de la Social-demokrata Partio en Finnlando (26. 1. ĝis 1. 2.) akceptis koncerne esp-on jenan rezolucion: 1. La partia kongreso instigas la partian gazetaron pli ol antaŭe propagandi la ideon de internacia lingvo k komuniki la progresojn de la esp.-movado inter laboristoj; 2. la partia kongreso admonas la partian grupon en parlamento fari iniciativon, por ke esp-o fariĝu libervola instrufako en mezlernejoj, k la diversajn partiajn grupojn pripensi, ĉu ekzistas motivoj por proponi ĝian transprenon en lernoplanojn de laboristaj institutoj.

LA NEFIDINDAJ KORESPOND-ANONCOJ

Ĉu la ricevo de pli ol 400 PK ktp. (vidu en n-o 277, pĝ. 197) estas la sola sukceso, aŭ ĉu fakte efektiviĝas reciproka koresp-ado en atentinda amplekso? Ŝajnas, ke K-do Epifanoviĉ ne legis la kapon de la korespondpaĝoj en "S-ulo", laŭ kiu ĉiu koresp-anto havas la devon respondi almenaŭ unu fojon... Mi estas unu el tiuj, al kiuj li ne respondis, K-do Dajber same plendis en n-o 243 pri li. (Vidu ankaŭ la lastajn "S-ulo"jn!). Nun en n-o 276 tiu K-do denove anoncas por koresp-ado. Mi ŝatus scii, por kiu celo li deziras tiom ampleksan koresp-adon. Kio estas seksfotoj de li dezirataj? Kial nek la Jarlibro 1928 nek la nova enhavas lian adreson, kvankam laŭ la citita matrikulo li ŝajnas esti SAT-ano eĉ ne la plej lastdata?

Entute la koresp-ado estas malfacila k riska afero. Mi de du jaroj klopodas aranĝi koresp-adon por nia lab. radio-grupo, sed preskaŭ sensukcese. En plej bonŝancaj okazoj ni interŝanĝas du leterojn, poste ne plu venas respondo. Miaj lastaj malsukcesoj estis PK al USSR, Leningrad, Poŝtkesto 305, Junularsekcio de SEU (anonco en n-o 244, mi skribis 22. 8. 29), k Leningrad, Nab. Roŝal, 8 LSPO, Mestkom. (anonco en n-o 267, mi skribis 1. 12. 29). Por la vane dum kelkaj jaroj elspezita afranko mi povus aĉeti bonan libron, ekz. la novan SAT-vortaron. Sed anstataŭe mi rikoltis preskaŭ nur ĉagrenon. *W. Behrmann (2105).*

MALGRANDAJ NOTOJ

Komuniko de Lab. Esp. Lernejo (LELO) en Halifaks (Britio)*

Ĉar la jarkunveno de l' Brita LEA okazos paskon en Londono, la LELO-komitato decidis starigi apartan programon okaze de tiu kunveno. Ĉiu SAT- k LEA-ano povas ĉeesti la kursojn je nunaj kondiĉoj (3 mk. g. = 3 angl. ŝil. tage). La gastdomo funkcias ĉiutage. Oni ĉiam trovas esp. K-dojn tie. Aranĝoj kun Junulara Sekcio por tendaro estas farataj. 8. marto okazos unua "Taga Kurso" por Halifaks- k Bingli-grupoj. Adr.: Halifax Road 9, *Denholm Gate*, West Yorks., Anglio.

* Vidu ankaŭ n-on 280.

Pri esperanta Morse-alfabeto

K-do N. Ĥolm (5459), Odessa, kies unuan artikolon pri supra temo ni presigis en n-o 266, k al kies projekto faris ŝanĝproponojn K-doj Moravec k 13 706 en n-oj 271, 272, prezentas novan prilaboritan projekton de alfabeto, kiun pro ĝia longo ni ne povas aperigi. Ankaŭ tiuj signoj havas intereson nur por limigita rondo el niaj legantoj. La alfabeto estas destinita por esp. radioamatoroj, kiuj komprenas esp. signalojn (pro tiu motivo K-do Ĥolm malakceptas la longsignalan solvon de K-do 13 706, kiu laŭ li necesigus transformon de l' telegrafaparatoj). Por trovi definitivan solvon en la afero, krei esp. radio-kodon, (sen prezento de l' eksperimentoj sur pĝ. de "S-ulo"!), ni forte konsilas al ĉiuj K-doj mallong-onduloj interesataj interrilati pri la afero skribe kun K-do Ĥolm. *Red.*

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

ALĜERIO. Alĝero. 23. jan. estis la mort-datreveno de nia K-do Neĝam Mohamed, sekr. de l' grupo "Ĉiam antaŭen". Okazis memorsoleno sur la tombo (19. 1.). K-do Bureau memorigis pri la sindonemo k batalemo de l' unua araba prolet-esp-isto, kies memoro ne devas esti forgesata inter la tutmonda esp-istaro. — *ESTONIO. Pärnu.* Ĉe loka lab. esp. grupo kurskomenco je 20. 1. laŭ rekta metodo kun 23 p. Komenciĝis je 21. 1. daŭriga kurso kun 56 p. Gvidas sveda instr. Strandmark. Ĉe loka junpionira taĉmento komenciĝis je 22. 1. kurso kun 33 p. Gvidas K-do Runs (15 428) laŭ "Petro". Intereso en tuta urbo por esp-o estas granda. La lingvo jam estas sufiĉe disvastigita dank' al la (sole ekzistanta ĉi tie) lab. grupo, kiu esp-igas la urbon. (15 428.) — *FINNLANDO. Loimaa.* Nian lokon vizitis (27./30. dec.) K-do W. Krey (5486) el Leipzig. Sekve de lia vizito 5 K-doj komencis lerni. — *GERMANIO. Frankfurt/M.* La Frankfurta SAT-rondo priparolis en du seriozaj kunvenoj la estontan laboron (jarplanon): pliigo je 100% de la anoj; fondo de junulara rondo; de virina rondo; plialtigo de l' abonantoj al "S-ulo" je 75%, al "LNE" je 500%. Kun tiu atingota forto ni ankaŭ povas riski jam hodiaŭ *inviti la 12-an SAT-Kongreson* al Frankfurt, kie 10 jarojn antaŭe okazis nia 2-a. Krome ni decidis unuvoĉe proponi, ke "S-ulo" enhavu ĉiusemajne la intern. radio-programon. Nuna peranto estas K-do Haupt (5662). Interrilatojn kun la admin. ordigas K-do Messmer (94). Gazetservanto (por kom. gaz.) K-do Nissen (10 464), (por soc.-dem. gaz.) K-do Mack. Kunvenoj ĉiun 4-an sabaton je 20-a h. en "Karlshof", Niddastr. (proks. de ĉefstacidomo). *Schweinfurt.* Okazis dum vintro 5 kursoj ĉe sportuloj k oficista junularo kun 70 p. La kursoj estis aranĝataj en la kadro de la sport-unuiĝoj mem. — *SOVETIO. Orel.* K-do Lingel, forlasinte esp. laboron en Belgorod en manoj de sia edzino, paroladis de 13. I. ĉi tie (ĝis fino de jan. 6-foje en div. lokoj). Rezulto: kurso el 40 p. en bombonfabriko. Kursdaŭro: 4 monatoj, lecionoj dufoje semajne. Oni uzas "Petro"n kun ruslingva ŝlosilo. Priesp. lekcioj ĝis fino de febr. Kelkaj kursoj formiĝas ankoraŭ. *(5081.)*

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La 25. januaro mortis en Parizo, 92-jara, generalo Seber (Sébert), unu el la plej meritplenaj batalantoj por la ideo de esp-o, kiun li subtenis morale (per sia aŭtoritata nomo) k materie (per mondonacoj k sia energio). Li estis pli vere sciencisto ol "generalo" en la kutima senco de l' vorto. Eminenta teknikisto, li estis depost 1892 membro de la Franca Scienca Akademio, al kiu li jam en 1898 prezentis raporton pri esp-o. La tutan antaŭmilitan tempon, kiam la movado floris en Francio, li klopodis ĉe oficialaj k sciencaj rondoj pri subteno al esp-o. Depost 1924 li ne plu publike partoprenis la movadon.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Gazetoj ktp.

Gazetservo de ITF. (Internacia Transportlab. Federacio). Sidejo: *Amsterdam,* Vondelstraat 61. N-o 1. Januaro 1930. Dusemajna. Prezo de jarabono: 2 hol. guld. (0.80 dol.). Suplemente estas liverata laŭdezira nacilingva eldono de presita Fed. Bulteno.

Tiu gazetservo hektografita, 5-paĝa, de ITF aperas unuafoje, en esp-o. Transportlaboristoj, unuavice fervojistoj, trovos en ĝi valorajn aktualajn sciigojn pri sindikata movado, salajroj, strikoj ktp. en div. landoj.

Karnevalo en Esperantio. Ilustrita "Revuo" sendependa kun ŝanĝebla titolo. Jubilea n-o! Prezo: 20 groŝoj aŭstriaj. Eld.: K-do H. Weinhengst, Wien X, Jagdg. 5-a, Hektografita. 4 pĝ. + suplemento.

Temas pri sprita gazeteto kun humoraĵoj prolettendencaj, ĉefe kontraŭkatolikaj, parte en prozo, parte en versoj.

Programo de VIII. Nacia Kongreso de Esp-o, Oviedo, 14.—18. sept. 1929. Bele ilustrita prospekto pri la urbo Oviedo (Hispanio) kun hispanlingva teksto pri kongres-aranĝoj.

Gvidilo tra Schweidnitz (Ŝvajdnic), provinca urbo en sudorienta Ger-

manio. Ricevebla kontraŭ unu PI aŭ respondkupono. Adr.: Esperanto-Informejo, Schweidnitz, Germ.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Uj Elöre, Novjorko, 24. 11., lerneja lab. en la tundro (264). *Cultura,* Lisboa, dec., lab. univers. en Sovetio (kun fotoj), *Pravda Severa,* Arĥangelsk, 12. 12., eldonind. en Jap. (261), 13. 12., Trad. festo en Angl. (269), 17. 12., Malŝatstr. en Hung. (267), Sekvoj de telorismo (258).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

El Socialista, Madrid, 26. 1. (longa prop. art. de K-do Azorin), Signalen, Stokh., 30. 1., Daily Worker, Lond., 3. 2., The Labour Woman, Lond., feb., L' Effort, Lyon, 1. 2., Le Travailleur Alpin, Grenoble, 1. 2., Juna Bolŝeviko, Kiev, 31. 10., 12. 12., 15. 12. (komenco de kurso), 19. 12., 22. 12., 29. 12., 5. 1., 9. 1., 16. 1., 19. 1., 22. 1., 26. 1., 30. 1., Veter k Vivo, Kiev, jul./aŭg. 29 Solidarität (lab. ciklista gaz.), feb. (vojaĝrakonto de germ. k franca ciklisto en fremdl.; malgrandaj anoncoj pri "S-ulo" n-oj 268, 272).

Peresper. materialon enpresis:

Der Atheist, Wien, 1. 2., Juna Bolŝeviko, Kiev, 29. 9., 10. 10., 6. 11., 11. 12., 22. 1., Pravda Severa, Arĥangelsk, 2. 12., 4. 12., 24. 12., 26. 12., 28. 12., 2. 12., 3. 12.

NIA POŜTO

11 586. — Via artikoleto aperos.

11 431. — Temas pri gramatika eraro. Devas nepre esti "ĝiaj".

13 286. — La tradukitan priskribon ni uzos en okazo de bezono.

10 662. — Pri la sorto de "Sen Hejmo" ni demandos. "Rajzele" taŭgas same nur por "LNE". Ni zorgos transsendon.

O. B. — Via artikolo aperos en unu el la sekv. n-oj. *Red.*

8048. — Via anonco alvenis tro malfrue. Cetere notu, ke tiajn anoncojn oni sendu rekte al Paris kaj la monon al Leipzig.

Al kelkaj Sovetianoj. — Se vi sendas PK por respondi, tiam uzu la ĝustajn "kun afrankita respondo".

13 790. — En listo de 10. 1., punkto 2286, ni ricevis nur 2 rubl. por ½ j. abono. Kotizo ne estas notita en ĉi listo.

Oberotov (Nadeĵdino). — Por kio vi pagis 4,25 rubl.? *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do Stefano Dalamasl, Stolzenthaler Gasse 5/4, *Wien-8,* kĉl. Gek-doj, pref. kun Francio, PM, PK, L.

K-do Ludoviko Toth, *Klein-Neusiedl ap. Fischa 1,* kĉl, L, PK, PI. Resp. garantiata.

— Dez. koresp. kĉl, krom Sovetio k Germanio, L, PI, nepre resp. K-do Frz. Ŝmidt, Matznerstr. 15/6, *Wien-13.*

K-do Fritz Cepusch, Bahnstr. 36, *Knittelfeld,* kĉl, PI, bfl, L. Resp. gar.

BULGARIO

K-do St. Uzunov, vil. *Novaĉene-Orhanie,* kĉl, L, PI. Resp. garantiata.

ĈEĤOSLOVAKIO

— Societa Lab. Gimnastik-Unuiĝo (24 pers.) koresp. kĉ, esp-aĵoj por ekspozicio. Adr.: J. Polivka, *Klatovy,* Nr. 323/3 ap. Plzen.

— Modellignaĵistoj laborantaj ĉe "Skoda fabriko" k samtempe turistoj (30 membroj) koresp. pri div. temoj kun samfakuloj. Adr.: J. Pelcman, Škvrnanská 24, *Plzen.*

FINNLANDO

K-do Waino Hellsten, *Loimaa,* kĉl, L, PM. Certe resp.

FRANCIO

K-do J. Butscher (19 j., komencanto), *Baldenheim,* B. Rhin, PM, PI, bfl, kun Sovetio k nordaj landoj.

K-do H. Butscher (20 j., komencanto), *Baldenheim,* B. Rhin, pri alp. sporto, politiko k ekonomio kun K-doj en Sovetio, Ĉinio k nordaj landoj.

K-do J. Cavaille, 2 Chemin des Sablonniers, *Lyon 3,* kun seriozuloj ĉl. pri div. temoj, L, PM, il. ĵurn.

GERMANIO

— Por grandega ekspozicio ni bezonas: il. gaz., ĵurn., afiŝojn, fotojn, esp-aĵojn, L, PK ktp. Oni sendu al: K-do R. Rudolph, *Olbersdorf b. Zittau i. Sa.,* Nr. 1602 — Certe resp.

K-do Franz Heck, Rödelheimer Landstr. 113, ptr., *Frankfurt-Rödelh.,* serĉas serioz. koresp-antojn en Francio, Bulgario, Rumanio, Hispanio, Japanio k Ĉinio pri bredado de silkraŭpoj.

POLIO

K-do Albert Wiener, Plebiscxtowa 13, *Katowice,* pri ĉ. temoj kun belgaj K-doj. Li estos antaŭ k dum la daŭro de Int. Ekspozicio en Liége.

SOVETIO

Gregori Kac (junkom.) Kloĉkovskaja N 10, kv. 7, *Ĥarkovo* 10, Ukrainio, kĉl pri junulmovado, polit. ekonom., kontraŭ religio.

K-dino Raĥil Notik (18 j.), ul. K. Marksa, N 26 kv. 22, *Ĥarkovo,* Ukrainio, kĉl, pri vivkondiĉoj de gejunularo, junulmovado, vivo de junulinoj ktp.

L. Karas, Stolarnij per N 7, *Ĥarkovo,* Ukrainio, pri div. temoj (vivo de laboristaro, gejunularo ktp., teknikaj demandoj).

K-do Apolinarij Sirota, Salgirnaja 3, Narkomfin, *Simferopol,* L kun seriozuloj pri politiko, lab. vivo, pentrarto, kĉl.

— Ŝakludantoj de gr. fervojista klubo ŝakludas kun lab. organizoj k izoluloj. Adr.: *Moskvo,* Kalanĉevskaja placo, Klub "ROR", Esperanto.

K-do Andreo Jasinskij, Karaimskaja 34, kv. 2, *Simferopol,* kĉl junuloj, pri ĉ. temoj, L, PK, PI.

K-dino A. Zeleznickaja, Novo-Basmannaja 10, kv. 82, *Moskvo,* pri ĉ. temoj.

K-dino Kuroĉkina, 3-ij Sborovskij per. 20, kv. 2, *Moskvo,* kĉl, pri ĉ. temoj, PI, esp-aĵoj.

— Junaj kom-istoj koresp. kun orientaj j. kom-istoj, ĉefe kun j. komistoj en Ĉinio. Adr.: *Kuzneck,* Siberio, ŝkola devjateletka, al K-do Nikolao Ĉursin.

K-do A. Ĉuĥnov (radiisto), str. Vorovskogo 63, *Barnaul,* kĉl, precipe pri radio.

K-do N. Poĵidaev, Korolenko str. 91, *Barnaul,* kĉl, L, PK, PI, PM, gaz., ĵurn.

K-do Ukolickij, telefonnaja stancija, gorodskaja, *Brjansk,* kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do A. Smirnov, Amurskaja ul. 31, *Stalingrad,* pri div. temoj, precipe pri muziko. Resp. garantiata.

K-do N. I. Ĉistjakov, Starosadskij per. 9, kv. 21, *Moskvo,* kĉl, L, PK, PI, PM, il. gaz., libroj, papermonoj ktp. Resp. garantiata.

K-do Dm. Jurikovski, pr. K. Libkneĥta 98, kv. 1, *Leningrado-22,* kun K-doj en Anglio, Usono k kun metaltornisto ĉl.

— Lab. grupo de marfabriko koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Adr.: *Sebastopol,* Korabeln. storona, ul. R. Luksemburg, 72, kv. 2.

K-dino Sima Gerasimova, ul. Poluproletarskaja 39, Darjino, *Sormovo,* N.-Novgorod, kĉl, pri ĉ. temoj.

K-dino Lusja Volkova, ul. Kitajskaja 4, Varja, *Sormovo,* N.-Novgorod, kĉl, pri ĉ. temoj.

— *Gejunuloj el tutmondo!* — Esp. rondeto ĉe Dymonova Litova lernejo de kamparana junularo koresp. kun grupoj k individuoj pri polit., agrikulturaj, sociaj k. a. temoj. Resp. garant. — Adr.: *P/O Krinki,* Vitebskij okr., S. Dymonov, Ŝ. K. M.

K-do Viktoro Krzevov (stud. konstr.), Katoliĉeskaja 44, *Nikolaev,* Ukrainio, kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

— Junkom-ista Gazeto "Molodyj Proletar" serĉas koresp-antojn en ĉl. Adr.: Ukrainio, Nikolaev, Redakcio de "Molodyj Proletar".

K-do A. Berezovskij, Vorovskogo 102, kv. 7, *Odessa* (lernanto), PK, PI, kĉl. Resp. garantiata.

SOVETIO (daŭrigo)

— 2 j. K-dinoj Lidia Koĥ k Milica Marcenicina koresp. pri arto, sporto, politiko, L, PK, PI, il. ĵurn. kĉl. Certe resp. Adr.: Muztrudŝkola Ostrovidova 61, *Odessa.*

— Garantias resp. SAT-ano 4024 al ĉ. junaj koresp-antoj ĉl. L, PK, PI, gaz. ktp. Adr.: Esp. grupo Muztrudŝkola Ostrovidova 61, *Odessa.*

K-do A. Knebelman, Lenina 72, kv. 2, *Odessa,* kĉl, PK, PI, bildoj. Resp. garantiata.

— B. Esperkoro, Raboĉaja 39, *Samara,* interŝ. klasbatalajn L, PK, PI. afiŝojn ktp. kĉl, pri IRH, socia vivo, radio.

K-do J. I. Ginesskij, Krasnoarmejskaja ul. 64, *Kazatin,* kĉl pri ĉ. temoj.

— Esp. rondeto ĉe lab. kursoj koresp. pri politiko, lab. vivo k ekonomio. Adr.: *Barnaul,* Vagonnie Masterskie, "Raboĉie Kursi".

— Esp. grupo de 21-a laborlernejo (850 geknaboj) koresp. pri ĉ. temoj kun geinfanoj ĉl, L, PK, PI, gaz., lernlaboroj ktp. Resp. garant. Adr.: 21-a Trudŝkola, Pl. Feuerbach, *Ĥarkov.*

— Esp. rondeto ĉe Sovetpartia lernejo koresp. pri lab. vivo, politiko k ekonomio, PK, PI, gaz., ĵurn. Resp. garantias Ŝ. Goldfeder. Adr.: *Barnaul,* Sovpartŝkola.

K-do K. Borisov, Bratskaja 10/44, *Astraĥan,* kĉl pri ĉ. temoj.

K-dino Vera Kasjuga, Starokonnij per. 12, kv. 14, *Odessa,* kĉl, pri junul. movado, L, PK, PI, ktp. Resp. gar.

— SEU-ĉelo k SAT-grupo koresp. kĉl, pri div. temoj. Adr.: Ukrainio, *Krjukovo ap. Dnepro,* Klubo "Kotlov".

K-do S. Suĥonin (17 j. laboristo) ul. Svoboda 138, *Sormovo ap. N.-Novgorod,* pri div. temoj, kĉl. Resp. gar.

— Pionira taĉmento je la nomo de Budjonnij, *Nikolsk-Ussurijsk,* Siberio, pri ĉ. temoj, kĉl.

SVEDIO

— 16-jara junulo dez. koresp. pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: Ivar Jansson, Lunden 448, *Skoghall.*

— 17-jara junulo dez. koresp. pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: Carl Ohgvist, Björkhagen 478, *Skoghall.*

— 12 K-doj koresp., L, PK, PI. Skribu klaran adreson! Adr.: Axel Ahlkvist, Freden 123, *Bjuv.*

Gravege!

Jenaj grupoj dez. konstante koresp. kun la samaj organizoj ĉl.: junkom. ĉelo, de Int. Ruĝa Helpo, radioamatora rondeto, turista grupo, rondeto de komencantoj k apartaj studentoj. Sendu multnombre L, PI (bfl) por ekspozicioj, gaz., fotojn, esp-oĵn. Ni ŝanĝos vortarojn esp.-diversnaciajn. Ĉio sendube estos rekompencata. Adr.: K-do Eŭg. Melnik (SAT-ano 12 874), Gorofiovska 16, Politeknikumo de ligilo, *Moskvo, 66.*

ATENTU!

Fraŭlino 18-jara dez. interŝ. belegajn PI, bfl, por pli bone varbi por esp. Sendu multnombre el tuta mondo, krom Germanio. Mi rekompencos ĉion per belegaj kartoj. Adr.: H. Seidel, pentristino, Reichsplatz 4, *Meissen/Sa.* (Germanio).

Bakistoj! Atentu!

Ĉu estas esp. amikoj, kiuj volas interrilati kun ni por interŝ. spertojn pri panbakejoj, teknike, konstruo de panfornoj, analizo de faruno k fermento, baki per vaporo. Ni estas panbakejo produktanta 2500 panojn po horo en unu el niaj fornoj. Skribu al: Frans Engels, De Keyzerlei 12, **Antverpeno,** Belg.

Gekamaradoj!
Helpu al ni propagandi esperanton!

Nia esp. organizo la 1-an de majo malfermos por-, per- k pri-esperantan ekspozicion, kiu havos fakojn: Salutleteroj okaze de unuamaja festo, kooperaci-movado, ruĝfrontbatalanta. gazetoj k ĵurnaloj, kiuj uzas esp-on (sendu po unu ekzemplero kun klarigo, nomo k. a.). Ni anoncas tiel frue por ke malproksimaj landoj partoprenu la ekspozicion. Ĉiu ricevas nepran respondon laŭ deziro. Se iu volos daŭre korespondi, notu pri tio. Ĉiujn ekspoziciaĵojn sendu laŭ adreso: U.S.S.R. *Tuapse* (ĉernom. okr.) Kolektivnaja, 4. Al K-do Belakov Bazilo (SAT 3935)

De la 18-a ĝis la 21-a de aprilo 1930 (pasko) okazos en ESSEN

LA 8-a ASOCI-TAGO DE LEA

POR GERMANLINGVAJ REGIONOJ

Samtempe okazos en Essen „Granda Laborista-Kultur-Varb-Semajno" kun ekspozicio nomita "ARKULA" (Laborista Kultur-Ekspozicio) aranĝota de preskaŭ ĉiuj prol. organizoj en Essen (vidu la konc. artikolon en ĉi tiu n-o). Atentigante la Gek-dojn en la tuta mondo pri la gravo de tiuj aranĝoj, ni petas la sendadon de 1. ekspozicia materialo por la div. prol. organizoj (afiŝoj, murgazetoj, ĵurnaloj, broŝuroj, fotoj ktp.); 2. koncizaj salutleteroj al la asocitago de LEA, al la Kulturekspocizio, al la div. prol. organizoj. Plie ni petas tiujn eksterlandajn Gek-dojn, kiuj iel povas ebligi sian viziton al nia kongreso, nepre sin anonci. Ĉiujn sendaĵojn ni rekompencos post la kongreso. — Ateistan materialon, kiun ni speciale petas por la Liberpensula ekspozicio, sendu al: Verband prolet. Freidenker für Rheinland-Westfalen, ESSEN, Kastanienallee 74. — Ĉion alian sendu al: Laborista Esperanto-Grupo, ESSEN, Bruchstrasse 47 a, I.

• Ni pruvu praktikecon de esperanto! •

Skribu multnombre!

1200 gel rnantoj de plej granda 9 jara lernejo en Krimeo deziregas interŝanĝi L PI il. gazetojn ktp. kun jun gelab. k gelern. tutm. Resp. k rekomp. p. interesaĵoj gar. Adr: Sovetio, Krim. ASSR, u. *Simferopol,* Dvorec truda. Bjuro Meĵrabsvjazi pri K. O. K. S. P. S., por 1-a lernejo.

Esperanto studata!

Germanio. — Laborista Fotista Unuiĝo

Loka grupo Forst N/L. dez. interŝ. fotojn ĉiuspec. kĉl. Skribu al: Hans Schulz, Kegeldamm 24. *Forst N/L.* Germanio.

TUTMONDAJ ATEISTOJ

Barnaŭla urbkonsilantaro de Militanta Ateista Unio alvokas vin al bona korespondado, interligo kaj interŝanĝo per: gazetoj, ĵurnaloj, fotoj, afiŝoj kaj aliaj ekspoziciaĵoj. Ankaŭ korespondas kolektive. — Adreso: USSR, **Barnaul,** "Gorsovet Bezboĵnikov".

Al tutmonda prol. lernantaro, pioniroj k junkomunistoj!

Gelernantoj, pioniroj k "komsomol"anoj de Taŝkenta fervojista duagrada lernejo "Decembristoj" koresp. kolektive k individue. — Skribu multnombre! Ni nepre garantias la saman k kolektivan resp.

Adr.: USSR, Uzbekistan, *Taŝkent,* ul. Kafanova 57, ŝkola Dekabristov, Kuĥarskij.

ENHAVO:

	pago
La estonta militarmilo	233—234
La pola imperialismo	234—235
Pri unueco kaj klasbatalo	235—236
Agado estas vivbezono	236—237
Kulturtaskoj	236—237
Diversaĵoj	237
Tago el mia vivo	238
Kiel mi fariĝis vegetarano	238
Diskutejo	238
Esperanto-Servo	239
Sennaciula Sporta Paĝo	240
Tra Esperantio	241—243
Korespondado, Anoncoj	243—244

Abontarifo al Sennaciulo: (La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.) **Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgoj 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉeĥoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, kr. 7 (8); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis. MONON ONI SENDU:** rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio),** poŝtĉek-konto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929 — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — La sovetianoj al CK de SEU, poŝtkesto n-o 630, Moskvo. En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero.**

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)